der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

25. Jahrgang | Nr. 158 (6/1989) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Pri la 74-a Universala Kongreso de Esperanto en Brajtono

Lanĉo

La ĉi-jara Kongreso, jam la 74-a, okazis de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto en la angla banloko Brighton (Brajtn). Partoprenis entute 2 300 personoj el 54 landoj.

El GDR partoprenis entute 6 personoj, inter ili oficiale **Hans Heinel** kaj **Detlev Blanke,** private 3 aliaj **(E.-D. Krause, A. Fichtner, J. Rohde)** kaj oficiala delegitino de Teknika Universitato Magdeburg **(G. Häusler).**

Iom neordinara estis la inaŭguro de la kongreso, kutime ĝis nun duparta: ekstera por diplomitoj kaj interna por la kongresanoj mem. La „ekstera" inaŭguro jam okazis vendrede, la 28-an de julio en Londono, nome en la fama Londona Guildhall (Gildhalo), la urbdomo de la brita ĉefurbo. En la jaro 1907, post la tria UK en Kembriĝo, **Zamenhof** prezentis paroladon la 21-an de aŭgusto en la gildhalo, en kiu li pledis por nova koncepto de patriotismo, kiu rekonus la kunfratecon de ĉiuj homoj. Rememore al tiu evento la 74-a Universala Kongreso de Esperanto estis lanĉita ĝuste en tiu loko. Partoprenis 200 kongresanoj, honoraj gastoj kaj ĵurnalistoj, bedaŭrinde inter ili nur tri diplomatoj. Eble la ideo de ĉi tiu lanĉo ja estis bona, tamen, vere mankis konvena ebleco, motivigi la diplomatojn, veni al la aranĝo, kiu ja estis iom malgranda kvankam luksa.

La Alta Protektanto de la kongreso ĉi-jare estis lordo **Wilson de Rievaulx,** ĉefministro de Britio de 1964 ĝis 1970 kaj 1974 ĝis 1976. Li i. a. estas honora prezidanto de la amikeca asocio Britio — Sovetio. Wilson eklernis Esperanton dum sia infaneco.

Kongresaj temoj

La kongrestemo estis „Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado", bone enkondukita de prof. d-ro **John Wells** en la kongreslibro kaj dum la inaŭguro (vidu paĝojn 124-125). La temo, kiu diverstitole ja ludis rolon jam dum multaj kongresoj, estis traktita dum ĝenerala kunveno kaj per diversaj prelegoj. Ĝi ankaŭ ludis rolon dum debato inter profesoro (kaj pledanto) por la angla lingvo, d-ro **Honey,** kaj prof. Wells, pledanto por Esperanto. Honey tre pragmatike defendis la anglan per argumentoj, kiuj elvokis reagojn de la esperantista publiko ne ĉiam adekvatajn al scienca disputo.

Ĝuste tiu aranĝo montris, ke eble ne estus superflue aranĝi seminarion pri la temo „Kiel konduti kontraŭ alipensantoj?" Per verdaj aplaŭdoj kaj superemociaj argumentoj oni ne povas varbi simpation por Esperanto, nur la kontraŭon.

Al la elstaraj programpartoj de la kongreso ankaŭ ĉi-foje apartenis la

Kongresa Universitato kaj la Esperantologia Konferenco. Sub gvido de la rektoro prof. d-ro **Richard H. Osborne** la 42-a serio de la IKU prezentis jenajn prelegojn: d-ro **Ingo Hofmann** (FRG): „Transe de la atomepoko", d-ro **Erich-Dieter Krause** (GDR): „Ĉu Esperanto devas pliriĉigi sian vorttrezoron?", d-rino **Marjorie Boulton** (Britio): „Iris Murdoch", d-ro **Bengt-Arne Wickström** (Svedio): „Merkato aŭ plano: kiel organizi la ekonomion?", **Janko Štruc** (Jugoslavio): „Fortiĝanta rolo de merkato en jugoslavia ekonomio", d-ro **Petr Chrdle** (ČSSR): „Ekologia kaj geokemia signifo de plantara sorbo kaj elimino de substancoj", d-ro **Àrpád Máthé** (Hungario): „Pri la centjara Esperanto-Gazetaro", **Povilas Jegorovas** (USSR): „Litova Esperanto-movado: historia skizo, nuna stato, perspektivoj."

La jam 12-an Esperantologian Konferencon gvidis d-ro **Detlev Blanke.** D-rino **Marjorie Boulton** (Britio) montris la gravan kontribuon, kiun donis **L. L. Zamenhof** por la evoluigo de literatura stilo en Esperanto. **Aleksandr Melnikov** (USSR) traktis la fenomenon de „esperantonimoj", do vortojn kun signifoj, kiuj estas kompreneblaj nur al esperantistoj (ekz. samideano, krokodili). D-ro **Erich-Dieter Krause** (GDR) komparis la afiksajn sistemojn de la indonezia lingvo kaj de Esperanto. Kaj fine d-ro **Detlev Blanke (GDR)** resumis la paŝojn, kiujn oni povas sekvi por enkonduki interlingvistikon kaj esperantologion en la lingvistikan pejzaĝon de lando.

Ankaŭ la 3-a konferenco de la Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC) estis grava aranĝo. Gvidita de d-ro **D. Blanke** ĝi montris la konsolidiĝon de la terminologiaj aktivecoj (kp. „der esperantist" 2/89). La „Tago de la lernejo" traktis la problemojn de la motivado de Esperanto-lernado flanke de la lernantoj. Al la jam tradiciaj programeroj ankaŭ apartenis la „Tago de la paco", kiun preparis kaj gvidis **Yoshimi Umeda** el Japanio. La kadraj temoj estis „Esperanto kiel ilo de pripaca edukado" kaj „La rolo de esperantistoj en la ekologiaj movadoj", du gravaj temoj, kiuj alvokis viglan debaton. Ankaŭ la publika kunveno de MEM okazis.

Dum la Universalaj Kongresoj ankaŭ klerigaj aranĝoj ludas grandan rolon. Pro tio ne mankis kursoj pri la angla kaj la kimra lingvoj, seminario pri la Cseh-Seminario kaj Cseh-kursoj, enkonduko en la Zagreban metodon. Krome okazis konversaciaj rondoj kaj eĉ lingvaj ekzamenoj.

Kompreneble multis la diversaj fakaj aranĝoj. Renkontiĝis la Akademio de Esperanto, Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, artistoj, ateistoj, aŭtomobilistoj, bibliotekistoj, la Bjalistoka Centro, blinduloj, legantoj de „El Popola Ĉinio", etnistoj, fervojistoj, filologoj, filozofoj, fotoamatoroj, gooludantoj, instruistoj, religiuloj diverssistemaj, juristoj, matematikistoj, medicinistoj, turismoorganizantoj, muzikistoj, poŝtistoj, radioamatoroj, vegetaranoj, verkistoj, veteranoj k. a. La Kubaj delegitoj informis pri la 75-a UK okazonta en 1990 en Havano.

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), kies direktoro estas prof. d-ro **Humphrey Tonkin**, elektis novan estraron, i. a. d-ron **D. Blanke** kiel sekretarion de CED.

Kulturo

La kultura programo estis tradicia, kaj malriĉa kompare al la jubilea kongreso 1987 en Varsovio. Komplete subnivela estis la Internacia Arta Vespero, kie ĉefe laikoj prezentis siajn tre dubindajn kapablojn, kun kelkaj esceptoj. Oni devas vere admiri homojn, kiuj ne kapablas kanti (bulgara sociologo), ne kapablas danci (jugoslavo kaj japanino), serioze deklamas poemojn kun forte (neintencita) satira efiko (mi neniam tiom amuziĝis pri tiu brito) kiuj tamen kuraĝis aperi sur la scenejo.

Tamen, al la bonsukcesaj kulturaj spektakloj apartenis la teatroprezen-

taĵoj „Kato sur varma ladotegmento" de Tennessee Williams (okcidentgermana grupo), „Eta Princo" de St.-Exupéry (kiel monodramo prezentita de **Barbara Lukaszewska** el Pollando) kaj „Kiel amas aliuloj", de Alan Ayckbourn (prezentita de angla grupo). Aparte inter gejunuloj furoris la slovaka rokgrupo „Teamo" kaj la nederlanda muzikgrupo „Kajto".

La nova Estraro

La ĉi-jara kongreso havis apartan signifon pro la elektoj de nova estraro de UEA. La Elekto-Komisiono de la Komitato de UEA, elektita 1987 en Varsovio, konsistinta el **Peter Todorov** (Bulgario, neaktiva), **Edvard Symoens** (Belgio) kaj d-ro **Detlev Blanke** (prezidanto de la komisiono), ne havis facilan laboron. Ĝi devis sondi kandidatojn por la nove elektota estraro, prezenti al la Komitato proponon, kiun tiu rajtis akcepti, malakcepti, modifi. Fine ja gravis, ke la ĝis nun laborinta estraro ne sentu sin maldankita pro la multa laboro. Sed same devas esti tute nature, ke ankaŭ novaj kandidatoj povas esti elektitaj, havu ŝancon por eklabori.

D-ro **Humphrey Tonkin,** kiu tiom sukcese gvidis la asocion dum multaj jaroj, mem petis senŝarĝigon kaj neniel pretis rekandidatiĝi por la ofico de la prezidanto kaj eĉ ne pretis eniri la novan estraron. Necesas substreki, ke li malakceptis tiujn oficojn pro novaj profesiaj ŝarĝoj (li estas rektoro de la Universitato Hartford en Usono) kaj por povi dediĉi sin pli forte al sciencaj aspektoj de Esperanto, i. a. al CED.

Finfine, post kunsidoj, diskutoj kaj polemikoj estis elektita nova Estraro de UEA. Prezidanto elektiĝis profesoro d-ro **John Wells,** fakulo pri fonetiko ĉe la Universitato Londono. Li ricevis 40 porajn voĉojn, la dua kandidato, **Yoshimi Umeda** el Japanio ricevis 22 voĉojn. Vicprezidantoj fariĝis d-ro **Ulrich Lins** (FRG), d-ro **So Gilsu** (Korea Respubliko), Ĝenerala sekretario elektiĝis **Osmo Buller** (Finnlando). Al la estraro krome apartenas **Spomenka Štimeć** (Jugoslavio), **Gregoire Maertens** (Belgio), **Oszkár Princz** (Hungario) kaj **Ivo Durwael** (Belgio). La aliaj du kandidatoj **Jean-Louis Texier** (Francio) kaj **Milan Zvara** (Slovakio) ne ricevis la necesajn voĉojn.

Do ŝajne la Estraro estas sufiĉe ekvilibrita kaj espereble faros bonan laboron. Dezirante al la estraro bonan sukceson oni devas sincere danki al la eksa. Aparte al ties prezidanto **Humphrey Tonkin,** sed ankaŭ al la zorge laborinta ĝenerala sekretario d-rino **Flora Szabo-Felsö** (Hungario), al la vicprezidantoj **Yoshimi Umeda** (Japanio) kaj **Gregoire Maertens** (Belgio), krome al **Diccon Masterman** (Britio/Italio), **Barbara Despiney** (Pollando, Francio), **Otto Haszpra** (Hungario) kaj **Jean-Louis Texier** (Francio).

Novaj aliĝoj

Se ĝis la Kongreso UEA entute havis 44 landajn asociojn, dumkongrese ĝia nombro bele kreskis. Aliĝis 5 novaj asocioj: Esperanto-Asocio de Ebura Bordo (Afriko), Pakistana Esperanto-Asocio, Sovetrespublikara Esperantista Asocio (SEU), Litova Esperanto-Asocio kaj Latva Esperanto-Asocio.

Cetere

Certe ni multon forgesis mencii. Tamen, nepre menciindas la vigla infankongreseto kun 33 infanoj el 15 landoj. Krome, fondiĝis ekologia Esperanto-organizaĵo.

La Komitato kunsidis almenaŭ 20 horojn, traktis kaj diskutis pri multaj aferoj koncernantaj la nunon kaj estonton de UEA. Aparte grava estis la akcepto de la fina versio de la Strategia Plano de UEA kaj de trijara laborplano. (Pri ambaŭ dokumentoj ni detale okupiĝos en iuj sekvaj numeroj de „der esperantist".) Kaj ĉiutage la plej novajn informojn pri la kongreso entenis la Kongresa Kuriero, ĉi-foje sub la nomo „La Kortega Cirkulero", redaktita de teamo sub gvido de **Ian Jackson**. La estontaj Kongresoj? 1990: Havano/Kubo, 1991: Bergen/Norvegio, 1992: Prago/ČSSR. **D. B.**

Brajtonaj impresoj

Kiel unu el ses esperantistoj de nia lando mi havis la grandan ŝancon, viziti Anglujon okaze de la 74-a UK.
Komence mi tre miris, ke nek Londono nek Brajtono bonvenigis la E-Kongreson per flagoj kaj slogan-rubandoj. Nur malgrandaj vojsignoj indikis la konferencejon, ĉefe por aŭtomobilistoj. Neniu brito montris scivolemon, vidante nin kun niaj E-saketoj. Kiam mi demandis miajn gastigantojn, ĉu la angloj tute ne interesiĝas pri tiaj eventoj, la respondo estis: Ni ja havas tiom da konferencoj kaj tiom da eksterlandanoj, ke por ni ili estas ĉiutagaĵoj.
Dum la kongreso mi vizitis ĉiujn aranĝojn pri Britio: du tre interesajn lumbildprelegojn laŭlonge de la marbordoj, kiuj i. a. atentigis pri ekologiaj konsideroj (William Green); prelegon pri ekonomiaj problemoj, lerte demonstritaj per la ekzemplo de la brita fervojo (Paul Gubbins); prelegon pri la minoritataj lingvoj de Britio (Albert Goodheir) kaj instruhoron pri la kimra (John Wells).
Por mi, instruistino de la angla kaj instruantino de Esperanto, la plej interesa aranĝo estis debato inter la profesoroj Wells kaj Honey, ĉu la angla aŭ Esperanto povos esti solvo de la monda lingvo-problemo.
Wells pledis por Esperanto per la konataj argumentoj, ke
— ĝi estas neŭtrala kaj garantias egalecon,
— ĝi estas regula kaj multe pli facila ol la angla,
— oni povus ŝpari tempon kaj monon, uzante ĝin.

Li diris kontraŭ la angla, ke
— ĝi estas la gepatra lingvo de 10 % de la monda laĝantaro, do favoras 10 % kaj malfavoras la plimulton,
— ĝi spegulas la potencrilatojn, kiuj daŭre ŝanĝas, do ĝi ne povas esti longtempa solvo.
— ĝi estas malregula kaj malfacila, do tutmonda uzo starigas gravajn problemojn.

Honey pledis por la angla per jenaj argumentoj:
— ĝi estas jam certagrade efika mondkomunikilo, do oni ne komencos je nulo per io alia;
— ĝi ebligas aliron al la mondkulturo por multaj popoloj.

Kontraŭ Esperanto li diris, ke ankaŭ
— ĝi ne estas kulturolibera, sed ligita al la eŭropa kulturo, do por neeŭropanoj ĝi starigas la samajn problemojn kiel la angla;
— ĝi disdialektiĝus, se ĝi fariĝus mondkomunikilo, do ĝi ne estus pli bona solvo ol la angla.

Kompreneble, la plimulto de la kongresanoj apogis profesoron Wells. Sed ankaŭ la kontraŭargumentoj de profesoro Honey estas pripensindaj.
Rande de la kongreso, tre plaĉis al mi la „ĝentila angla maniero", kiun oni renkontis ie ajn. Vendistoj kaj kelneroj ĝojis pri klientoj kaj afable dankis ilin; stratpasantoj pacience klarigis al mi la vojon aŭ helpis min telefoni. Mi neniam havis la impreson ne esti bonvena.

Gerda Häusler

Debato en Brajtono

„Lingvo kaj egaleco en internacia komunikado"

Kiel kongresan temon de la 74a UK ni elektis unu el la kernaj demandoj de lingvopolitiko en la mondo: kiel la elekto de lingvo(j) por internacia komunikado povas esti harmoniigita kun la postulo pri egala traktado de ĉiu individuo kaj grupo.
Lingvo: Kia estas nun la efektiva situacio? Kiujn lingvojn oni uzas por ebligi (aŭ provi ebligi) komunikadon

inter individuoj kaj grupoj, kiuj denaske parolas malsamajn lingvojn? Ĉu ne, se dano renkontas nederlandanon, plej ofte la anglan? Se kameruniano parolas kun flandro, la francan? Se ĉeĥo kun uzbeko, la rusan? Se japano kun hindo, denova la anglan? Kio okazas en traktado inter kompanioj? Kio okazas interne de plurnaciaj sciencaj esplorgrupoj? Kio okazas interne de la grandaj organizaĵoj? En UN? La esperantistoj proponas uzi unu komunan lingvon por ĉiaj internaciaj kontaktoj, lingvon simplan kaj neŭtralan. Ĉu tiu propono liveras solvon? Ĉu ĝi estas realisma? Ĉu ĝi estas realigebla?

Egaleco: Ni ŝanĝu la nacio-parojn en la supraj ekzemploj. Se usonano volas komuniki kun arabo, ĉu ne la komunikado normale okazas en la angla? La araboj faras grandajn strebojn por lerni la anglan, sed la inverso ne okazas. Se senegaliano parolas kun franco, ili uzas la francan, ordinare ne la volofan. Tiuj, kies denaske lingvo estas la volofa, devas lerni la francan; sed la francoj ne devas lerni la volofan. La estonoj devas lerni la rusan, sed la rusoj ne devas lerni la estonan. Estas evidente, ke en tiuj situacioj ne ekzistas egaleco. Male, la demando, kiu lernas kies lingvon, dependas de la potencrilatoj inter la koncernaj grupoj. La pli malforta grupo devas uzi la lingvon de la pli forta. Forteco povas esti ekonomia plipotenco. La Esperanto-movado celas tiri la lingvodemandon el la luktejo de potencpolitiko, por trovi neŭtralan solvon, do justan kaj egalan. Ĉu tio estas atingebla?

Internacia: Per „internacia" ni povas kompreni diversajn aferojn. Povas esti, ke interne de iu ŝtato troviĝas anoj de diversaj nacioj, tiel ke por ili „internaciaj" rilatoj estas ankaŭ enlandaj: tiusence ni povas paroli ankaŭ pri „interetna" aŭ „intergenta" komunikado, kvankam se temas pri lingvoj temas esence pri komunikado inter diverslingvanoj. Sed ordinare per „internacia" ni pensas pri rilatoj inter ŝtatoj, inter landoj, en kontinenta aŭ monda kadro. Ĉu la lingvoproblemo bezonas unu solvon, aŭ plurajn? Ĉu povas esti diversaj solvoj je diversaj niveloj (ekz. unu solvo por la lando Belgio, alia solvo por la Eŭropa Komunumo, ankoraŭ alia solvo por Unuiĝintaj Nacioj)?

Komunikado: Komunikado povas esti de plej diversaj specoj. De simpla konversacio inter unuopuloj, tra la bezonoj de komerco kaj industrio, scienco kaj tekniko, ĝis la traktadoj inter suverenaj registaroj. Aparta demando estas la amaskomunikiloj. En la gazetaro komencas aperi pli kaj pli da ĵurnaloj celantaj internacian legantaron (ĉu usona aŭ angla ĵurnalo, aperanta en „eŭropa eldono", limigas sin al eksterlande loĝantaj usonanoj kaj britoj, aŭ serĉas legantaron vere internacian?). Ankaŭ por la eldonistoj de libroj, forigo de la lingvaj baroj signifus gravan avantaĝon de skalo. La alveno de persatelita televido jam signifas, ekzemple, ke en okcidenta Eŭropo oni nun povas ricevi televidprogramojn en diversaj lingvoj: ĉu tio signifas, ke la angla lingvo nun inundas ĝissufoke la tutan EK? Ĉu en la lasta linio decidas la ekonomiaj fortoj? Ĉu tio nepre signifas la triumfon de la angla lingvo?

Brajtono estas[1]) bona loko por debati tiujn demandojn. La kongreso okazas ja en la hejmo de la lingvo, en la lando, kie tiu lingvo naskiĝis kaj unue evoluis. Ni diskutu, ĉu la angla prezentas solvon al la monda lingvo-problemo. Kiaj estas ĝiaj lingvaj kvalitoj? Kia estas ĝia vera pozicio en la mondo? Ĉu ĝia pozicio donas, aŭ povas doni, „egalecon"? Ni diskutu, kial ni proponas alian solvon. Kiaj estas la lingvaj kvalitoj de Esperanto? Kia estas ĝia vera pozicio en la mondo? Ĉu per Esperanto oni povas atingi egalecon en internacia komunikado?

John Wells

[1]) [El la Kongreslibro. Ni skribu „estis"! Ĉar la temo restas aktuala, ankaŭ post la kongreso, ni ĉi tie represis la enkondukon.]

Kongresoj en Kubo 1990

La 74-a UK okazos de 14-a ĝis 21-a de julio 1990 en Havano. La 45-a TEJO-kongreso de 21-a ĝis 28-a de julio 1990 en Playa Giroń (porka golfo).

Interesuloj pri ambaŭ kongresoj skribu al GDREA por ricevi informojn pri partopreneblecoj.

Elekto de B-Komitatanoj 1989

En la Komitato de UEA, la plej alta gvidinstanco de la asocio, estas tri specoj de komitatanoj. La Komitatanoj A estas nomumataj de la landaj asocioj. Por GDREA ties prezidanto Hans Heinel estas Komitatano A. Komitatanoj B estas elektataj rekte de la ĉirkaŭ 8 000 individuaj membroj de UEA, kaj la Komitatanoj C estas iel aparte kompetentaj personoj, kiujn la Komitatanoj A + B alelektas al la komitato. Dum pli ol 10 jaroj d-ro Detlev Blanke estis Komitatano C. En la komitato de UEA post la 71-a UK en Pekino la disdivido estis jena: 65 A, 6 B kaj 14 C. Antaŭ la 74-a Kongreso estis novelektoj por B-Komitatanoj. El inter 16 kandidatoj estis elektitaj 8 komitatanoj: Humphrey Tonkin (Usono), John Wells (Britio), Yoshimi Umeda (Japanio), Stefan Mac Gill (Nov Zelando/Hungario), Ursula Gratapaglia (Brazilio), Ulrich Lins (FRG), Detlev Blanke (GDR), Ĝila Saheb-Zamani (Irano).

Pli da esperantistoj de GDR eksterlande

Estas observebla pozitiva evoluo rilate partoprenon de esperantistoj el GDR en Esperanto-kongresoj okazantaj en nesocialismaj landoj. La 73-an Universalan Kongreson en Rotterdam, en la jaro 1988 krom la oficiala delegitaro de GDR ankaŭ private (proprakoste) partoprenis 6 aliaj membroj de GDREA. Krome unu membro de la Centra Estraro partoprenis la IFEF-kongreson en Perpignan/Francio. En la jaro 1989 la IFEF-kongreson en Salon/Hispanio partoprenis 3 personoj. La 74-an Universalan Kongreson de Esperanto en Brighton/Britio partprenis 4 pluaj personoj ekster la dupersona oficiala delegitaro. Unu membro de GDREA sekvis inviton al Finnlando. Alia membro partoprenis la kongreson de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj dum aŭgusto 1989 en Caerleon/Britio. Aldone al la dupersona oficiala delegitaro tri junulinoj partoprenis proprakoste la 45-an Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Kerkrade/Nederlando.
Krome, menciindas, ke pli ol 60 membroj de GDR, aparte gejunuloj, povis partopreni aranĝojn en Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario pro transpagaj plifaciligoj, kiujn donis GDREA. Kompreneble, ĉiujn helpojn, menciitaj supre, la Centra Estraro de GDREA nur donas al efektivaj membroj, kiuj krome aktivas.

Rudolf Hahlbohm 80-jara

La 2-an de januaro 1990 la vicprezidanto de GDREA Rudolf Hahlbohm festos sian 80-an naskiĝtagon.
Lerninte Esperanton dum la juneco, Rudolf Hahlbohm post la milito akiris meritojn pro la revigligo de la Esperanto-movado en GDR. Kiam en la jaro 1965 fondiĝis Centra Laborrondo Esperanto en la tiama Germana Kulturligo, Rudolf estis ties kunfondinto kaj membro de la prezidio. Post la morto de la unua prezidanto de CLE Rudi Graetz, Rudolf Hahlbohm fariĝis la nova prezidanto de la Centra Laborrondo. Nun li aktivas ankoraŭ multe kiel vicprezidanto de GDREA kaj donas siajn spertojn al nia asocio. Tre kore gratulas pro la jubileo la Centra Estraro de GDREA.

Japanaj infanoj pentras por la paco

Ekde kelkaj jaroj Stralsundaj esperantistoj flegas siajn amikecajn kontaktojn kun japanaj pacamikoj. El tiu kunlaboro rezultis ekspozicio de infanaj pentraĵoj pri la temo „Kiel mi imagas vivon en paco?". Stralsundaj infanoj sendis al Osaka 28 pentraĵojn, japanaj infanoj eĉ 40 al Stralsund. Tiel, kune kun aliaj ricevitaj materialoj kaj pli malnovaj desegnaĵoj el Japanio, de la 5-a ĝis la 7-a de oktobro en bela domo de Kulturligo en Stralsund, la Schele-Domo, estis videbla tiu ĉi ekspozicio, laŭdita de gastoj kaj lokaj gazetoj.
Grandan dankon meritas la organizintoj, sed precipe Sumiko Goto, japana pacamikino, kaj ŝiaj lernantoj.

Laŭ informo de H.-J. Borgwadt

La Festivalo en Phjongjang

Laŭ propono de TEJO, kunpreparinto kaj partopreninto de la 13-a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentaro en la ĉefurbo de Korea Demokratia Popola Respubliko, nia asocio turnis sin al la nacia preparkomitato de GDR por la festivalo kun la peto preni ankaŭ junan esperantiston en la vicojn de la oficiala landa delegacio. Pro la lastatempaj bonaj kontaktoj de nia junulara komisiono kun Libera Germana Junularo (FDJ), ni ricevis pozitivan respondon. La junulara estraro elektis min por la partopreno.

Laŭ alia vojo, kadre de eldistriktaj proponoj, aliĝis eĉ dua esperantisto, junulara aktivulino el Dresden, Martina Schwarz. Entute la TEJO-delegacio notis dek esperantistojn el kvin landoj (Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, FRG, GDR) pluraj aliaj certe ĉeestis, sed ne anonciĝis (vidu malsupre la raporton de M. Schwarz).

Dum la oficiala TEJO-delegacio agadis kaj efikis diversmaniere [J. Koszmaluk informis en „TEJO-tutmonde" 4 (40)/89)], la esperantista agado de la aliaj pro la malgranda nombro restriktiĝis al kelkaj renkontiĝetoj, tamen ĉefe efikis dum multaj interparoloj kun diverslandaj, interesaj junaj homoj.

La festivalo mem estis granda evento, malgraŭ ĉiuj diverĝantaj opinioj pri la utiloj de tiaj laŭtaj manifestacioj. Ĝi estis utila por tiuj partoprenintoj, kiuj ne baris sin malantaŭ pretaj antaŭjugoj koncerne aliajn konvinkiĝojn, kiuj ne rezignis pro la tro pompa ekstera aspekto de multaj aranĝitaj mitingoj, kaj kiuj ne vidis sian ĉefan taskon alporti dum tiuj kelkaj tagoj iun dubindan liberecon al la cetere simpatia, diligenta, multon suferinta, unuavide timida (koncerne eksterlandanojn), sed tamen tre scivolema (pro ĝia izoliteco) popolo de norda Koreio. La festivalo utilis al tiuj, kiuj serĉis personajn kontaktojn (dum la oficialaj interdelegaciaj renkontiĝoj, dum la longaj noktoj). Mi ne forgesos la ardajn diskutojn, ĉu kun reprezentantoj el Nagornij Karabaĥ, klarigantaj siajn naciajn emociojn, ĉu kun tiuj batalantoj de PLO, optimismaj pri baldaŭa venko de la Intifada, sed samfervore kontraŭkomunismaj (kvankam rekonantaj la subtenon de socialismaj landoj por sia lukto). Ĉu kun la gejunuloj el Nikaragvo venintaj rekte el bataloj, ĉu kun junaj francaj komunistoj kiuj elsuĉis nin pri evolutendencoj en GDR, kaj mi povus daŭrigi. Ne malofte la diskutoj estis dolorigaj, sed ĉiam sinceraj kaj celantaj komprenon. Jen kiel mi komprenas la sencon de tiuj festivaloj.

Tamen la respondecaj internaciaj junularaj instancoj prave nun diskutas eventualajn ŝanĝojn en la Festivaloj aranĝoj.

U. Becker

Idealo kaj realo kaj unufoje travivita ilian sintezon

Mondaj Festivaloj. Ili estas simbolo por la progresema junularo kaj ardaj provoj al inter-nacia dialogo.

Phjongjang 1989 nun jam staras en la historio kiel pruvo, ke ankaŭ la alia kontinento plu malfermiĝis kiel tribuno por progresiva pensado. De longe la homo kreis diferencojn en sia labora medio inter homoj kiel li kaj estas pro tiu ĉi kaŭzo hodiaŭ tia, kia li estas: homo. Sed same signifoplenaj, kiel estas la malegalecoj por la evoluo, ankaŭ estas iliaj forigoj.

La homaro pli kaj pli ege strebas al solvoj de siaj konfliktoj simple por savi sian specon. Kiamaniera dum la XIIIa Monda Festivalo la 1 500 junaj homoj el pli ol 2 000 naciaj kaj internaciaj junularaj organizaĵoj nun uzis sian ŝancon de konatiĝo, de interkompreniĝo kaj de alproksimiĝo?

Tradicie okazis multaj oficialaj renkontoj inter la diversaj nacioj, inter reprezentantoj de diversaj konvinkoj kaj kredkonfesoj, same kiel komunaj manifestacioj sub la slogano: „Por kontraŭimperiisma solidareco, paco kaj amikeco!"

Oni dancis, kantis, ridis kaj ege bone sentis sin en tia internacieca vigleco en Phjongjang.

Post la organizita taga programo kun la disponeblaj tradukistoj oni havis la eblecon kun siaj propraj rimedoj — lingvokonoj kaj kuraĝo — trovi aŭ ne trovi kontaktojn kaj interŝanĝon. Bone estis, resti en la vestiblo de nia Junulara Hotelo aŭ sur la homplena Kwangbok-strato. Sola oni ne estis longe, ĉiuj estis scivolemaj unu pri la alia, pri fremdaj nacioj, scivolemaj pri la opinio de la alia. Kaj temoj estis sufiĉaj. Tro valora estis la tempo por heziti kun iuj demandoj (ŝatataj estis la vesper- kaj nokthoroj jam pro tio, ĉar ili pli facile forigis la diferencojn kaj lingvobarojn!).

Sed kiamaniere oni interparolis, soife je scioj kaj sen tradukisto? La angla havis la senrestriktan hegemonion. Eĉ la fieraj francoj min ne alparolis en sia gepatra lingvo. Kaj por la rusa nur unufoje estis ebleco uzi ĝin: Dum nia pikniko en arbaro en tajlora sido ni provis (!) interparoli kun koreaj ruslingvaj studentoj.

Kaj Esperanto? Mi povis ĝin paroli kun la TEJO-reprezentantoj Jan Koszmaluk (PL), Dagmar Schütte (FRG) kaj Thomas Bormann (FRG) kaj krome kun du aliaj hazarde renkontitaj esperantistoj. La atingeblaĵo de la XIIa Monda Festivalo en Moskvo — 60 esperantistoj el 8 landoj — staris por la KDPR[1] nur kiel neatingebla grando en malproksimeco, krom la malcentra situo de la festivala metropolo kaj la vojaĝkostoj, estas certe la respondeca ĉeffakto, ke mankis la esperantistoj de la gastiginta lando. Tial por mi povas esti nur malforta konsolo, ke mi hazarde renkontis denaskan esperantiston inter la „SDAJ"[2] — delegitoj. Ni ja havis la lukson interparoli dulingve ...

La 6-an de julio estis renkonto inter la estro de la sekcio por internaciaj rilatoj de la korea junulara organizaĵo kaj la TEJO-reprezentantoj. Okazis ĝenerala informacia interŝanĝo .Ni ekscis, ke ĉe altlernejoj de KDPR ekzistas esperantistoj. La multnombraj diskutoj dum la 12 tagoj en KDPR montris al mi, — sendepende de tio, ĉu mia vidalvidulo venis el Sudano, Ganao, Madagaskaro, Turkio, Irako, aŭ Maŭretanio ... la intereso pri neŭtrala internacia lingvo estas granda. Aparte junaj evoluŝtatoj volas liberiĝi de la lingvo de siaj estintaj koloniaj potenculoj, savi sian propran kulturon antaŭ tiuj influoj. Tamen la lingvo-problemo estas nur unu el multaj solvendaj konfliktoj kaj ne la plej grava. Tio estas la opinio de kuracisto el Irako, kiu jam de 10 jaroj vivas en ekzilejo en Sirio kaj kiun ankaŭ mi ne rajtis ekkoni kun lia vera nomo. Dum siaj lingvaj studoj li aŭdis pri Esperanto, sed en lia patrujo oni decidas inter vivo kaj morto ... Ankaŭ en niaj propraj vicoj ne mankis intereso pri Esperanto. Multaj sentis la mankojn, kiujn kunportis la konversaciaj provoj sen tradukistoj sur la festivalaj stratoj.

Por longa tempo do tio ne povas kontentigi: danci kune kaj nur interŝanĝi la nomojn kaj la ŝtataparteneconn. Sed ja kiu vere regas la anglan?

Bedaŭrinde mi devis sperti, ke aparte la laboristoj inter niaj delegitoj ne ofte komencis fremdlingvajn parolprovojn. Sed kion ni volas?

Mi pledas por rimedo de interkompreniĝo, sendiferenca por ĉiuj.

Martina Schwarz

[1]) KDPR — Korea Demokratia Popola Respubliko
[2]) SDAJ — Socialisma Germana Laborista Junularo el FRG.

Protesto

Post la ekscio pri la aresto de la Sudkorea studentino Rim Sugjong pro ŝia partopreno en la Festivalo en Phjongjang, la aŭtorino de la supra artikolo, M. Schwarz, skribe protestis kontraŭ tiu ĉi malhumana ago postulante ŝian tujan liberigon. La karaktero de la festivalo, pacamo, kunlaboro, diskutado, neniel rajtigas al persekuto de iu ajn partopreninto.

Forpasis Ilse Serowy

La 28-an de oktobro 1989 forpasis la longjara sekretariino de GDREA, Ilse Serowy, el Berlin, Griechische Allee 1, Berlin, 1160. Ŝi laboris de 1965 - 1982 kaj faris grandan kontribuon al la reevoluigo de la Esperanto-movado en GDR. Ni konservos al ŝi honoran memoron.

CE de GDREA

La restarigo de SEU

Pil ol 200 delegitoj kaj kelkdek gastoj el la tuta lando kunvenis al la malfermo de la 3-a Tutsovetia konferenco de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) la 23-an de januaro en la Domo de kulturo kaj scienco en Moskvo. Ili devis pridiskuti la nuntempan situacion, kiu formiĝis en ASE, kaj difini la vojon por la estonto. Ne hazarde la parolo far prezidanto de ASE doktoro pri filologioj Magomet Isajev estis ne raporto, sed medito pri la temo: „Esperanto-movado en la epoko de la rekonstruo", kaj la kvar kunparoloj prezentis diversajn variantojn de organiza rekonstruo en ASE-laboro, aparte reliefigante la problemon de interrilatoj centro-periferio (sep ASE-filioj kaj ducento da Esperantaj kluboj).

Preskaŭ du tagojn daŭris streĉaj diskutoj: oratoroj sinsekvis sur la tribuno, dekoj da demandoj kaj replikoj direktiĝis el la salonego, dufoje okazis voĉdonado por daŭrigo de diskutoj, antaŭ ol la plimulto venis al la fina decido. Sed ĉi tie necesas iom flankiĝi por prilumi la historion de la esperantista movado en nia lando.

Kiel estas konate, la lingvo naskiĝis en Ruslando. Ruslingve en la jaro 1887 publikiĝis la unua lernolibro, en Rusio (Moskvo, Peterburgo, Saratovo) aperis la unuaj kluboj. La unua esperantista adresaro (1889) enhavis 1000 adresojn, el kiuj 800 estis ruslandaj. Sed post kiam en 1895 en la revuo „Esperantisto" estis publikigita la letero de Leo Tolstoj (cetere, li sciis legi Esperante) „Pri la menso kaj kredo", la cara cenzuro malpermesis importon de la revuo kaj dek jarojn oni ne rajtis aperigi novajn eldonojn en tiu lingvo. Nur la revolucio de 1905 forigis la malpermeson, tamen ankaŭ en la komenco de 1917 la registaro ne permesis eldoni esperantlingvan ĵurnalon en Petrogrado. Dufoje, en la jaroj 1910 kaj 1913, okazis eĉ la tutrusiaj kongresoj, sed krei tutrusian unuiĝon oni ne sukcesis, kaj la milito rompis ne nur internaciajn, sed ankaŭ enlandajn ligojn.

La Oktobro de 1917 estis revolucio internacia: la establon de Soveta potenco de Petrogrado ĝis Tomsko, samkiel la civitanan militon, plej aktive partoprenis ne nur la popoloj de la estinta Rusa Imperio, sed ankaŭ centoj kaj miloj de eksterlandaj laborantoj, militkaptitoj, loĝantoj de okupitaj fare de la germana armeo regionoj — hungaroj kaj kroatoj, ĉinoj kaj ĉeĥoj, aŭstroj kaj bulgaroj, latvoj kaj estonoj. Ni danke rememoras la nomojn de Josif Broz-Tito, Jaroslav Hašek, Oleko Dundiĉ. Ĵenj Fušenj, Bela Kun, Lu Czeĵun, Ferenc Munniĥ kaj multaj, multaj aliaj internaciistoj.

Estis formitaj internaciaj rotoj, batalionoj, regimentoj, brigadoj. Certe, la komuna lingvo estis la rusa. Tamen . . . la internacia ideo de Esperanto ĝuste en tiuj ŝtormaj jaroj ricevis novan evoluon, kaj en pluraj milittaĉmentoj de Ruĝa Armeo, precipe kie estis armeanoj-internaciistoj, ili kune kun rusaj soldatoj kaj komandantoj lernis la internacian lingvon Esperanto. Kaj en la jaro 1921 aperis unuiĝo, kiu baldaŭ estis nomita Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU, ruse SESR).

Dum kelkaj jaroj SEU iĝis unu el la plej grandaj esperantistaj organizoj en la mondo — en la jaro 1927 ĝi havis ĉirkaŭ 16 mil membrojn. Eldoniĝis la revuo „Sur posteno", populara inter esperantistoj de multaj landoj, kaj pli specialigita revuo „Internacia lingvo"; al dekoj da landoj estis dissendata abunde eldonata literaturo — de la Programo de Komintern ĝis la versa romano de Puŝkin „Eŭgeno Onegin"; estis preparata por eldono la 16-voluma kolekto de Lenin-verkoj. Al la „stabejo" de SEU — la granda ĉambro en komunuma apartamento de loĝdomo en la strato Spiridonovka (nun la strato Aleksej Tolstoj) — senĉesa interrompe venadis leteroj — reeĥoj al niaj eldonoj. Funkciis koresponda kurso.

Sed jam en la mezo de la 30-aj jaroj la situacio ŝanĝiĝis. Somere 1933 la hitlera registaro „reorganizis" la asocion de germanaj esperantistoj kaj

rompiĝis la ligo kun la plej potenca eksterlanda organizo. Malfaciliĝis ligoj ankaŭ kun aliaj landoj. Tamen en 1934 en SEU ankoraŭ membris ĉirkaŭ 9 000 personoj.

Komenciĝis la hispanaj eventoj. Inter la internaciistoj-volontuloj, luktantaj kontraŭ frankistoj, multaj estis esperantistoj. Tiam mi estis studento kaj memoras la dankleterojn pro niaj eldonaĵoj, venantaj al SEU de tiuj kontraŭfaŝistoj, kaj la Jurnalo de Moskva ŝtata universitato publicis leteron de hispanaj respublikanoj, tradukitan el Esperanto.

Fine de la 1937-a aŭdiĝis onidiroj pri aresto de niaj ĉefaj aktivuloj kaj gvidantoj de SEU ... En februara tago de 1938 mi venis, kiel kutimis venadi multaj moskvaj esperantistoj, al la „stabejo" en Spiridonovka kaj tre miris, vidinte sur la pordo grandan seruron. Mi frapis la najbaran pordon kaj demandis al la elirinta virino: „Kial pendas la seruro? Ja la tago estas labora." Ŝi respondis: „Sed hieraŭ ili estis arestitaj ..."

Tiel perforte estis ĉesigita la agado de SEU. Antaŭnelonge ni eksciis en Militprokurorejo de USSR, ke la juĝesploristoj de PKIA[1]), lertaj pri similaj elpensoj, inkrimis al la estraro de SEU la organizon de „trockista-esperantista-spiona centro". Nature, tia centro neniam ekzistis ...

Kiam somere 1940 la konsiston de Sovetio aliĝis la tri ĉebaltaj respublikoj, la samaj puninstancoj ĉesigis la agadon de iliaj esperantistaj organizoj, iliaj gvidantoj kaj aktivuloj estis reprezalitaj. Ankaŭ ili ĉiuj estis akuzitaj pri spiona agado.

La jaro 1957. En Moskvo okazas Tutmonda Festivalo de junularo kaj studentoj. Inter la eksterlandaj gastoj estas esperantistoj, ili deziras renkontiĝi kun kolegoj. La festivalestroj organizis serĉadon, esperantistoj troviĝis, verdire, ne ĉiuj junaj ...

Renaskiĝo de la movado startis. Vere, restarigi SEU oni ne sukcesis — al la plej aktivaj entuziastoj-veteranoj, estis transdonita la opinio de la „ĉefa ideologo": „Lernu oni la rusan!" Malgraŭ tio ekfunkciis rondetoj kaj kluboj, aperis someraj tendaroj por 200 — 300 personoj. De la jaro 1963 la sovetiaj esperantistoj helpe de Unio de sovetiaj societoj por amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksterlando (ruse — SSOD) komencis partopreni tutmondajn esperantistajn kongresojn, kaj en la jaro 1966 grupo da junaj aktivuloj kreis, kiel oni dirus nun, la neformalan organizon: Sovetian Esperantistan Junularan Movadon (SEJM). Baldaŭ ĝi fariĝis sufiĉe multnombra, eldonanta „subplanke" periodaĵojn, sed ... ne agnoskita oficiale.

En marto 1979, 41 jarojn de post la ruinigo de SEU, estis fondita ASE. Prezidiano de ASE, vicestro de internacia fako de Tutlanda centro de sindikatoj (ruse — VCSP) Georgij Kanajev prave atentigis dum sia elpaŝo en la ĉi-jaŭara Konferenco, ke mem ideo pri ASE — kreo estis bona, sed la formoj de la fondiĝo kongruis la periodon de la ordon-administraj metodoj; tio signifas, ke kiel fondintoj estis enpaĝitaj la hazardaj grandaj financposedaj organizoj — VCSPS (Sindikatoj), SSOD (Amikecasocio), CKVLKSM (Centra Komitato de komsomolo), sed iliaj taskoj kaj funkcioj ne estis determinitaj; same ne estis difinitaj la formoj de ASE-organizo, la perspektivoj de ĝia agad-evoluo.

Baldaŭ evidentiĝis, ke el la tri fondintoj nur SSOD, kies kolektiva membro iĝis ASE, plenumis sian taskon efektivigi internaciajn ligojn de ASE — tiusfere dum la lastaj 10 jaroj estis farita multo, kvankam povus esti farita pli. Sed la enlanda laboro (instru-metodika, kultura ktp.) estis ekster SSOD-kompetento kaj ne konvenis al ties strukturo. La jura memstareco, deklarita en ASE-Statuto, restis surpapera. La du ceteraj fondintoj entute ne komprenis, kion ili devis kun ni fari, kaj se surloke iuj sindikataj aŭ komsomolaj komitatoj efektive helpis al kluboj kaj filioj de ASE, do iliaj centraj organizoj limigis sian agadon ĉe dissendo en la jaro 1979 de cirkuleraj leteroj, pri kiuj mem tiuj forgesis ...

Poiome kreiĝis tia situacio: surloke kreskis kvanto de kluboj (ĝis pli ol

[1]) PKIA — Popola Komisariato pri Internaj Aferoj, ruse NKVD.

200), fondiĝis iliaj regionaj unuiĝoj (en Uralo, Siberio), sed multaj problemoj de enlanda laboro ne estis solvataj, kaj poste sinsekve estis rompataj limdatoj de la gvidorganaj kunvenoj — ĝuste kiam tutlande signife kreskis la socia aktiveco de la civitanoj. Somere de la pasinta jaro dum multaj regionaj esperantistaj renkontiĝoj evidentiĝis la natura malkontento de la esperantistaro pri la situacio kaj maturiĝis la ideo pri restarigo de SEU. Rezulte en la lasta jarkvarono la esperantistoj de Litovio, Latvio kaj Estonio okazigis ekstervicajn konferencojn de siaj ASE-filioj, restarigis siajn ĉesigitajn en 1940 organizojn kaj, sekve, ne plu restis filioj de ASE. De la ĉebaltaj organizoj la ĉi-jaran Konferencon partoprenis nur ASE-estraranoj.

Por la atento de la Konferenco (okazinta kun dujara prokrasto!) estas prezentitaj kelkaj variantoj de la estonta organiza strukturo — de la propono nenion ŝanĝi (ankaŭ tia estis!) ĝis la ideo krei iun konfederacion. La reprezentanto de Litovio, ASE-estrarano Povilas Jegorovas proponis, ke dum formigo de la nova estraro ne la Konferenco elektu la kandidatojn de, ekzemple, Litovio, sed mem litovoj elektu kaj rekomendu la personon por la tutlanda estraro; li kaj lia estona kolego parolis pri memstara, pretermoskva aliĝo de novaj respublikaj organizoj al internaciaj Esperantaj organizoj. Proteste al ili, la gvidanto de esperantistoj de Rostovo-sur-Dono, ASE-estrarano Aleksandro Melnikov reliefigis, ke plej gravas surloka agado, kaj tie neniu iun limigis, sed reprezenti Sovetan Union en internaciaj organizoj kaj renkontiĝoj povas nur tutlanda organizo.

Kaj jen la fino de la dua labortago, la diskutoj finiĝis. Komenciĝas la voĉdonado. Per plimulto de la voĉoj oni akceptas la decidon: restarigi SEU surbaze de ASE — kiel tutlandan memstaran socian organizon, kalkuli la 3-an Konferencon de ASE, konsiderante la du antaŭajn, la 8-a kongreso de SEU.

La renaskiĝinta SEU estas konsiderata heredanto kaj de la antaŭmilita Unio, kaj de la Asocio, kiu al la komenco de ĉi-jaro kalkulis — laŭ neplenaj donitaĵoj — ĉirkaŭ 6 000 mebrojn (inkluzive ĉirkaŭ 1 400 en Ĉebaltio). Iliaj ĉefaj taskoj koincidis, sed la strukturoj diversis. La Statuto de SEU multe malaktualiĝis. Tial la Kongreso akceptis provizoran Statuton. Estis elektita la Estraro de SEU — la prezidanto, la vicprezidantoj, la gvidantoj de komisionoj laŭ labordirektoj.

Nikolaj Zubkov,
honora kulturaganto de RSFSR.

[El „Moskvaj Novaĵoj", proveldono en Esperanto, aprilo 1989]

Neordinara publicaĵo el Moskvo

Unu el la plej konataj sovetiaj ĵurnaloj, aperanta en naŭ lingvoj kaj pro tio legata en multaj landoj de la mondo, estas „Moskvaj Novaĵoj" (Moskovskije Novosti, Moscou News k. s.). La redaktoro de la araba eldono estas la konata esperantisto Vladimir Samodaj, nun prezidanto de la Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU), pri kies restarigo ni abunde raportis en „der esperantist". „Moskvaj Novaĵoj", cetere, estas eldonata de la Unio de Sovetiaj Amikec-asocioj kaj Kulturaj Ligoj kun Eksterlando (SSOD), kiu siatempe estis la tegmenta organizaĵo de la dissolvita Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE), kaj de la gazetara agentejo Novosti. (En la rondoj de sovetiaj esperantistoj oni skribas „presagentejo", rekta kaj kruda eraro). Laŭ la peto de multaj eksterlandaj esperantistoj, la redakcio de „Moskvaj Novaĵoj" eldonis provnumeron en Esperanto (aprilo 1989). Estas la espero, se la reeĥo sufiĉus, ke povus aperi regula monata esperantlingva eldono, kiu entenus la plej interesajn materialojn de la semajna revuo. Oni diras, ke la revuo „Moskvaj Novaĵoj" publikigas aparte interesajn materialojn pri la rekonstruo (perestrojko) en Soveta Unio.

Kion, do, prezentas la provnumero? Ni trovas i. a. longan intervjuon kun du aŭtoroj de biografioj de Stalin,

analizon pri pensio en USSR, kosternajn kontribuojn pri krimeco en USSR, eseojn pri perestrojko kaj ties problemoj, artikolon pri la sekvoj de Ĉernobil, intervjuon kun la sovetia verkisto Naum Korĵavin (loĝanta en Usono), pri la restarigo de SEU (kiun ni publikigas ĉi-numere en „der esperantist") kaj literaturaĵojn de Puŝkin, Lermontov, Gulia, Ŝevĉenko kaj Aĥimalova. En la prezenta artikolo ni i. a. legas: „Vi certe rimarkis, ke plejparte la materialoj estas kritikaj — ni kritikas nian vivon por kuraci ĝin, por trovi la ĝustajn rimedojn, kiuj helpas al ni forigi niajn sociajn malsanojn, kiuj, bedaŭrinde, akumuliĝis sufiĉe multaj, pro tio, ke ni tro longe ĝojkantis, kvazaŭ ĉio estas en bona ordo. Tiu ĉi provnumero aperas dank' al tiu naŭdeko da leteroj (el 18 landoj), kiuj pledis por aperigo de „MN" en Esperanto, sed tiu kvanto da interesitoj ne povos esti sufiĉa por regula eldonado. La tasko de la provnumero estas esplori la interesiĝon kaj surbaze de tio decidi — ĉu ĝi restu la sola „MN"-numero en Esperanto, aŭ ĝin sekvu pluaj kaj pluraj regulaj numeroj."
Do, petu rekte de la redakcio la provnumeron kaj esprimu vian opinion: Moskovskije Novosti, USSR, Moskvo, Gorki str. 16/2, Soveta Unio. Se la revuo eldoniĝos regule en Esperanto, GDREA klopodos atingi la abonigeblon ĉe la Germana Poŝto. **D. B.**

Konferenco de ILEI '89

Dum la 23-a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu okazis ekde la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1989 en la ĉarma urbeto Caerleon (GB), ne malproksime de la urboj Newport, Cardiff kaj Bristol, estis pritraktataj fakaj problemoj sub la temo „Motivado en la lerneja instruado de Esperanto".

Partoprenantoj el 18 landoj analizis diversajn flankojn de la ĝenerale ekzistantaj lernmotivoj kaj demonstris praktikeblajn instrupaŝojn por pli efike kaj celkonscie elreliefigi ĉe la lernantoj tiujn motivojn, kiuj elstaras en fremdlingvo-lernado pro siaj humanisma kaj personecevoluiga valoroj. Aparta atento estis dediĉata al la instrumotivado, t. e. al la bezonoj de instruistoj mem rilate al konstanta pliperfektiĝo surkampe de eksterlingva kaj ekstermetodika scioj.

Parte paralele, parte aldone al la oficiala programo de la konferenco kunsidadis la estraranoj de ILEI — Edward Symoens (B), Audrey Childs-Mee (NL), Malcolm Jones (GB), Bertil Andreasson (S), Till Dahlenburg (DDR), Stefan MacGill (H) — por plikonkretigi la estontan laboron. La konferencanoj je ĉiuj etapoj de la decidopreparoj havis la eblecon, formuli siajn starpunktojn kaj enmeti siajn proponojn.
Fine estis laŭtlegitaj i. a. jenaj decidoj:

1. La nova ekzamen-sistemo, kiu jam estas je dispono en presita formo („Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj de la internaciaj ekzamenoj de UEA kaj ILEI kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj". Roterdamo/Antverpeno 1989, 36 p.) estos plilarĝigita per postularo laŭ la supera nivelo. Tiu postularo kun detalaj klarigoj estu ellaborita ĝis la sekva estrarkunsido en februaro 1990 (Budapeŝto).

2. La temo de la 24-a ILEI-konferenco (Kubo 1990) estos „Naciaj trajtoj en instruado kaj lernado de Esperanto". Per tia relative vasta formulo al ĉiuj interesitoj el la plej diversaj mondopartoj estas donita la ebleco kontribui en konsidero de la landaj specifaĵoj rilate la metodikon, la lernmaterialojn, la parolalproprigon ktp.

3. La „Tago de la lernejo" dum la venonta UK en Kubo paralelas laŭ la temo al la menciita 24-a ILEI-konferenco kaj estos titolita „Naciaĵoj kaj internaciaĵoj en Esperantolernmaterialoj". Tia titoligo devigas kontribuontojn kiel eble plej konkrete doni enrigardon en objektive kaŭzitajn apartaĵojn de la unuoplanda klerigpolitiko.

4. Por la jubilea, 25-a konferenco de ILEI en 1991 estas proponita la temo „Konsciigo pri la lingvo-problemo en la mondo pere de E-instruado". Per tia formulo ILEI intencas emfazi la signifon de la Strategia plano de la kunligo de la lingvo-instruado kun disvolvigo de la mensa memstareco.

Aliaj decidoj koncernis rilatojn kun UEA, la kunlaboron kun la landaj sekcioj de ILEI, la altigon de la ILEI-kotizo kaj la moralan subtenon de fakaj ellaboraĵoj (ekz. de „Interetna vortaro" de L. Mee/NL).

Dr. Till Dahlenburg

Rokmuziko el Slovakio

Jam de pluraj jaroj TEAM' estas unu el la plej popularaj slovakiaj rokgrupoj. Ĝiaj ses profesiaj muzikistoj sukcesis furorigi plurajn el siaj kantoj sur la scenejo de la nacia rokmuziko, atingi ĉiam pli grandan nombron da junaj homoj en Slovakio. Ilia manaĝero estas Stano Marĉek, redaktoro de „Esperantisto Slovaka". Tio ne mirigas se oni scias, ke la membroj de la grupo ankaŭ estas esperantistoj. Sian unuan esperantlingvan rokkoncerton la grupo realigis jam en 1981, kaj nun, post la apero de pluraj nacilingvaj malgrandaj kaj unu granda sondiskoj, post multaj radiaj kaj televidaj registraĵoj ĉekulmine de nacia sukceso, ĝi planas etendi sian „Esperantan karieron". Ĝi komencis turnei kun esperantlingva koncerto (Kerkrade, Brighton), proponas sin al aliaj grandaj Esperanto-aranĝoj (organiza estro: Stano Marĉek, Zvolenská 15, 03601 Martin, ČSSR) kaj eldonas sian unuan Esperantan sondiskon. Tiu ĉi disko estis registrita ĉe la slovaka sondiska entrepreno OPUS, la eldonrajton por ĉiuj landoj krom Ĉeĥoslovakio aĉetis la kooperativo de „Literatura Foiro", LF-Coop., kiu ankaŭ prizorgis la esperantlingvajn tekstojn de la sondisko.

Informoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Oficejestro de ČEA

La 1-an de aŭgusto 1989 ekfunkciis en la oficejo de ČEA nova funkciulo — nome la oficejestro. La funkcion plenumas samideano inĝ. Zdeněk Pluhař, konata el la faka movada agado/origina profesio kemiisto. Li estas plene okupata en la asocio, kio certe bone influos glatan funkciadon de la oficejo.

Infoservo

Ĉeĥa Esperanto-Asocio establis propran ekonomian organizaĵon „Infoservo", kies direktoro fariĝis PhDr. Petr Chaloupka. La organizaĵo prizorgos libromerkaton, tradukservon kaj aliajn laborojn por la membraro de ČEA sed ankaŭ por eksteraj interesuloj.

SAEST '89

En la tagoj 7. — 9. de julio 1989 okazis en la sudmoravia urbo Strážnice la Seminario pri aplikado de Esperanto en scienco kaj tekniko (SAEST). La ĉeftemo estis „Trafiko" honore al la 150-jariĝo de la unua fervojlinio en la meza Eŭropo, kiu estis Vieno-Brno. La seminarion partoprenis 48 fakuloj el deko da landoj, kiuj prezentis aŭ aŭskultis dudekon da prelegoj. La faka nivelo estis tre alta kaj ankaŭ la socia programo estis interesa kaj allega. Kolekto de la referaĵoj aperos en plejproksima tempo danke al subteno de IFEF.

Jubilea aranĝo de ČEA

La 20-jariĝon de Ĉeĥa Esperanto-Asocio oni omaĝis dum la „Festotagoj" en la urbo Havířov (Havirĵov) proksime ĉe Ostrava en la tagoj 25. — 27. de aŭgusto 1989. La tritaga programo enhavis inaŭguron de la ekspozicio pri agado de la asocio, renkontiĝon de instruistoj kaj lernantoj de skribaj Esperanto-kursoj, solenan kunvenon, kunvenojn de kelkaj sekcioj de ČEA — fervojista, pedagogia, scienc-teknika, blindula, medicinista kaj porpaca. En la kultura par-

to oni spektis la teatraĵon „Brava soldato Švejk" en prezento de Studia Teatro el Lodzo — Pollando, koncertis la kanthoro „Muzilo" de PEA, prezentiĝis la ĉeĥaj opersolistoj Miroslav Smyčka, Josef Vích, Alina Farná, aktoris Eva Seemannova, Miroslav Henke, pianon ludis Jiři Vychodil. En distraj programoj prezentiĝis diversaj amatoroj el rondetoj de la Kultura Centro en Havířov inkluzive lokajn orkestrojn. La renkontiĝon ĉeestis ĉirkaŭ 250 personoj, inter tiuj oficialaj delegitaroj de E-asocioj el GDR (el GDR partoprenis la membro de la prezidio de GDREA, Siegfried Linke), Hungario, Pollando, Bulgarujo kaj Jugoslavio, kiel gastoj ĉeestis Roman Dobrzynski — vicprezidanto de UEA, J. Giessner — prezidanto de IFEF, Yosimi Umeda el Japanio kaj pluraj esperantistoj el — krom menciitaj landoj — Sovetunio kaj Aŭstrio. Dum oficialaj partoj de la „Festotagoj" ĉeestis reprezentantoj de la urbaj politikaj kaj ŝtataj oficoj.

La „Festotagoj" vekis intereson de la Ĉeĥoslovaka televido, Ĉeĥoslovaka radio kaj gazetoj, kiuj ĉiuj alportis kelkajn informojn pri la evento. La kolektantojn interesus oficiala poŝta stampo, kiu estis uzata en la poŝto Havířov 1.

La „Festotagoj" kontribuis al prestiĝo de ĈEA ĉe la nacilingva publiko.

Jura Vortaro

La nombro de fakaj vortaroj estis vastigita pri la Esperanto-ĉeĥa parto de Jura vortaro, kiun kompilis JUDr. Karel Traxler. La 164-paĝa broŝurita libro kompletigas la pasintjare eldonitan unuan parton, kiuj sume enhavas 10 000 kapvortojn, kunmetitajn esprimojn kaj frazojn el la jura praktiko.

V-a Centra Renkontiĝo de GDREA 1990

De la 25-a ĝis 27-a de majo 1990 en Brandenburg okazos la V-a Centra Renkontiĝo de GDREA. Brandenburg tre bele situas en la lago-riĉa regiono de la rivero Havel kaj estas post 90-minuta veturo facile atingebla de Berlin.

La tradician Centran Renkontiĝon povas partopreni ĉiu ajn esperantisto el GDR. Ni ankaŭ atendas partoprenantojn el la eksterlando. La celo de la renkontiĝo estas doni aktivigajn impulsojn por la plua agado de la esperantistoj de GDR. La Centra Renkontiĝo fariĝos kulmino en nia asocia vivo.

Resumante la aktualan staton de GDREA oni certe devas okupiĝi almenaŭ pri jenaj problemoj: a) pli celkonscia apliko de Esperanto en la praktiko, b) altigo de la lingva kaj faka nivelo, c) junularo, d) helpo al novuloj (i. a. de la koresponda kurso) trovi la vojon al GDREA kaj aktiviĝi.

La Centra Renkontiĝo estos bunta kaj proponos ion interesan al ĉiu: debatoj, renkontiĝoj kun estraranoj kaj redaktoroj, forumoj, kulturo, amuziĝo, literatura servo k. a. La tranoktoj ĝenerale estos turistnivelaj. La partoprenprezoj estos moderaj.

Do — jam faru tri aferojn: a) Notu la datojn en via kalendaro! b) Se vi planos partopreni, jam nun anoncu vin senformale al la Centra Estraro de GDREA (Esperanto-Asocio, O.-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080), c) faru proponojn pri la programo!

Voĉo el Latinameriko

„Esperanto estu ponto inter evoluantaj kaj evoluintaj landoj"

La redaktoro de ‚TEJO-tutmonde', Andy E. Künzli, intervjuis s-ron Alberto F. Calienes, 27-jara programisto en la Fremdlingva Eldonejo ‚José Marti' en Havano (Kubo), estrarano pri Eksteraj Rilatoj de Kuba Esperanto-Asocio. Alberto estas esperantisto ekde 1979. Lige kun sia funcio en KEA, li okupiĝas ankaŭ pri la organizado de la IJK venontjare en Kubo. Jen kelkaj demandoj kaj respondoj.

TT: Kara Alberto, baldaŭ okazos en Kubo la IJK. Indas scii pli multe pri la historio de Esperanto en via lando.

Alberto: Plej verŝajne Esperanto atingis Kubon jam dum 1895 pere de hispanaj soldatoj. La unua societo ne fondiĝis antaŭ 1907. Tiu societo, kiu bone laboris, ŝajne vivis nur du jarojn, ĝis 1910, kiam fondiĝis alia nova societo, Societo Kuba por la propagando de Esperanto, kiu aliĝis al UEA kaj aktivis ĝis la 40aj jaroj. La Esperanto-movado en Kubo vere fariĝas forta nur post la fondiĝo en 1979 de Kuba Esperanto-Asocio. Tiam laŭ la nova aprobita leĝo de asocioj la nova organizaĵo de la kubaj esperantistoj rapide atingis du aŭ tri milojn da membroj. Kuba Esperanto-Asocio ĉi-momente havas inter 1 500 kaj 3 000 membrojn, kaj la agado por Esperanto en nia lando estas sufiĉe disvastigita, mankas esperantistoj en nur tri provincoj, kaj en la planoj de nia asocio estas porti Esperanton al tiuj provincoj antaŭ la Universala Kongreso en la jaro 1990, kio estas venontjare. Kuba Esperanto-Asocio aliĝis al UEA en 1983 kaj klopodas iel helpi kaj sekvi la planon de tiu organizaĵo en la landa sfero, kaj tiukaze mi menciu la kunlaboron, kiu ekzistas jam de antaŭ kelkaj jaroj inter UEA kaj nia asocio. Ni nun organizas la Universalan Kongreson de la jaro 1990, kaj Kuba Esperanto-Asocio dediĉas siajn plej grandajn fortojn al tiu ĉi granda manifestacio de la E-movado.

TT: Kiajn agadojn vi konsideras viajn ĉefajn?

Alberto: Se paroli pri la ĉefaj agadoj de KEA, mi nepre menciu unualoke la instruadon. La instruado en nia lando okazas laŭ sistemo tute organizita, ne en kluboj, sed en lernejoj. Ili havas pli malpli similan statuson al tiuj de la normalaj lingvolernejoj en mia lando, kaj dum ĉiuj tagoj de la semajno, escepte de sabatoj kaj dimanĉoj, okazas la instruado laŭ grupoj, en kiuj membras ĉirkaŭ 30 personoj. Tio donas al la instruado tute alian karakteron, kaj ĝis nun tio montriĝis des pli efika, ĉar la lernejo fariĝas centro ne nur de la instrua, sed ankaŭ de la kultura agado de la esperantistoj.

TT: Kiel vi karakterizas la aktualan staton de Esperanto en Latinameriko?

Alberto: Mi konas ĝin tre malmulte. Nia internacia konferenco por la evoluo de Esperanto en Iberameriko ‚Esperanto 88' okazinta decembre en Havano iel celis ankaŭ la konatiĝon kun la movado en tiuj landoj. Tre bedaŭrinde, kunsidis reprezentantoj nur de Meksikia Esperanto-Federacio, Brazila Esperanto-Ligo, Kolombia Esperanto-Ligo kaj Kuba Esperanto-Asocio. Tio kompreneble ne donas realan bildon pri la situacio en la tuta kontinento. Mi tamen diru, la kunsido evidentigas, ke niaj asocioj havas grandegajn homajn rimedojn kaj la kunlaboro inter niaj amerikaj landaj asocioj, kiu celu interalie ŝparon de fortoj kaj utiligon de komunaj rimedoj ne nur en la informado pri Esperanto, sed ankaŭ en la instruado kaj en la akcelo de la kultura viviĝo de la lingvo. Tio povas doni al la E-movado en nia regiono

grandegan forton. La kunsidintaj reprezentantoj, inter kiuj mi ne forgesu mencii la prezidanton de Brazila Esperantista Junulara Organizo kaj la prezidanton de la Junulara Sekcio de Kuba Esperanto-Asocio ankaŭ esprimis en kelkaj dokumentoj la deziron de ĉiuj organizaĵoj, kiuj laboras por Esperanto en nia regiono vere akceli la kunlaboron por plirapidigi la kontribuon de nia regiono al la internacia E-movado. Kaj pri tio Kuba Esperanto-Asocio, kunlabore kun UEA, organizas la 75an Universalan Kongreson de Esperanto. Pri tio oni certe okupiĝas tre serioze, kaj dum la kongreso evidentiĝos la amerikeco ne nur en la diskutoj, sed ankaŭ en la kultura programo.

TT: Kaj kion vi malkovros al ni pri la 46a IJK en Kubo?

Alberto: En Moskvo mi diskutis kun la prezidanto de TEJO, Jan Koszmaluk, kaj kun la ĝenerala direktoro de UEA, Simo Milojecić, kaj kvankam ankoraŭ ne estas precizigitaj ĉiuj detaloj, tre baldaŭ aperos ĉiuj informoj pri la IJK. Dume, nia Junulara Sekcio de KEA jam antaŭvidas la partoprenon de multaj gejunuloj el nia regiono precipe. Kaj dum niaj konversacioj en Moskvo kun la reprezentantoj de E-asocioj kaj junularaj sekcioj el socialismaj landoj evidentiĝis granda intereso partopreni tiun IJKn en Havano.

TT: Ĉu Esperanto havas ian sencon por Latinameriko?

Alberto: Tio estas tre interesa demando, des pli ĉar parolante pri tiu regiono oni pensas, ke tie ekzistas nur unu aŭ du lingvoj, la hispana kaj portugala. Kaj fakte ĉiam oni forgesas tiujn aliajn lingvojn, kiujn uzas la loĝantoj de aliaj landoj en la regiono, ekzemple la francan, anglan, keĉuan, ajmaran, guarani kaj multajn aliajn lingvojn. La esperantistoj ne povas uzi la samajn formulojn, kiujn uzas la esperantistoj ekzemple en Eŭropo. Estas tute aliaj kondiĉoj en Eŭropo kaj Latinameriko, kaj la E-movado devas serioze konsideri tiun realan fakton. En niaj landoj la propagando por la internacia lingvo baziĝas preskaŭ ĉiam sur la aserto, ke Esperanto estas facila lingvo, ke oni lernas ĝin, ĉar ĝi donas plurajn eblecojn interŝanĝi kaj konatiĝi kun kulturoj, kun homoj, ktp. Plej verŝajne tio ne funkcias en niaj landoj, kaj oni devas doni al la homoj en tiu subevoluinta mondo la ŝancon vere aliri al la kulturaj kaj sciencaj intelektaj fontoj de la homaro.

TT: Do, se la prasloganoj ne efikas en Latinameriko, kiun konkretan rolon ludu Esperanto en tiu mondoparto?

Alberto: En nia regiono prefere estu tiu de ponto, perilo inter tiuj evoluantaj landoj kaj la jam evoluintaj. Inter ili devas esti perataj scienco kaj tekniko. Kaj por Esperanto kaj por Latinameriko tio povus esti granda ŝanco, se Esperanto ekludus rolon en scienco kaj tekniko. Se la movado vere deziras enradikiĝi en tiu regiono, devas ekzisti vera utiligo de la lingvo, kaj ne nur tiuj romantikaj bildoj pri la brila estonteco kaj la fina venko.

TT: Kiel vi vidas la perspektivojn por Esperanto en ties dua jarcento?

Alberto: Mi konsideras, ke la E-movado estas nur unu, tamen ĝi samtempe estas sufiĉe bunta. Kaj en la dua jarcento estus multe pli bone unuigi la fortojn kaj lasi la diferencojn. Krome oni devas vere analizi, kian rolon ludu Esperanto en la aktuala situacio de la mondo.

TT: Dankon, Alberto, pro viaj interesaj eldiroj. Mi deziras grandegan IJK-sukceson venontjare ĉe vi en Kubo kun la certeco, ke la kongreso fortigas vian movadon.

[Intervjuo farita en Moskvo, aprilo 1989. El „TEJO-tutmonde" 3 (39)/1989]

„Humanismaj kontraŭ teknikaj sciencoj"

estis la temo de Internacia Seminario de Bulgara Esperanto-Junularo okazinta 5. — 6. 10. 1989 en la Internacia E-kursejo en Pisanica, BG. Krom e-istoj el la gastiganta lando partoprenis franco, FRGanoj, gegrekoj, GDRano, luksemburgano kaj svedinoj.
La elstara bulgara E-instruisto Nikola Uzunov tuŝis en sia prelego la ĉiam pli rapide disvolviĝantajn sciencojn kaj la tiel rezultantan mondan lingvo-problemon: „Malgusta pritakso kondukas al du esperantistaj pensmanieroj: Ni ne sukcesos (pesimismo) aŭ: Ni tuj enkonduku Esperanton ĉiuloke (supertakso). La meza vojo signifas evoluigi E-on ĉiusfere kaj eluzi la nunajn eblecojn.
Reprezentanto de la bulgara junulara organizaĵo parolis malkaŝe pri la ĝenerala situacio en Bulgario: „Estas malĝuste timi fareblajn erarojn. Ne parolante pri iuj problemoj oni simple ĉirkaŭiras ilin."
La konata bulgara esperantisto-matematikisto Petko Arnaudov prelegis pri: „La junularo kaj la naturaj sciencoj en la dua jarcento":
„Junuloj pli iniciatemas, maljunuloj jam kutimiĝis al multo. Al novaj atingoj teknikaj aliĝas plej facile junuloj, kion atentu ankaŭ la E-asocioj!"
Fine de la dua tago okazis mallongaj raportoj pri la aktivecoj de la opaj junularaj Esperanto-organizaĵoj, pri Baha-ismo kaj la lasta Universala Kongreso en Brajtono la partoprenantoj streĉe aŭskultis surbendigitan dum tiu UK diskuton pri la temo „Esperanto kontraŭ la angla" inter la profesoroj John Wells (nova UEA-prezidanto) kaj John Honey (lektoro de la angla en japana universitato).
Dum unu tuta tago okazis ekskurso al muzika lernejo en la arkitektur-rezerveja urbeto Širokа Lâka kaj al la ripozloko Pamporovo, kie situas televida turo kun kafejo en alteco de 1940 metroj.
Vespere aktivigis la kantemulojn internacia kaj nacia bulgara korusoj. Pro la Nacia Festo de Bulgario iun vesperon kunvenis ĉiuj vilaĝanoj de Pisanica en la kurseja manĝosalono por ronddanci laŭ Rodopaj melodioj kaj naciaj muzikiloj.
Ankaŭ vin atendas interesaj aranĝoj, daŭre en Pisanica! **Bert Schumann**

Esperanto-funkciuloj en Poprad

De la 13-a ĝis la 26-a de aŭgusto 1989, en la Internacia Kultura kaj Kleriga Centro Poprad, Slovakia Esperanto-Asocio okazigis denove Internacian Lernejon por Esperantaj Funkciuloj (ILEF). Ĉi-jare partoprenis en ĝi ĉirkaŭ dudek esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Sovetunio, Hungario kaj GDR.

La seminarion gvidis du spertuloj, mem longjaraj funkciuloj en siaj asocioj: d-ro Árpád Rátkai vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio, kaj Milan Zvara, la multokupita sekretario de Slovakia Esperanto-Asocio.

Dum la unua semajno d-ro Á. Rátkai prezentis kronologie la historion de la internacilingva movado kaj kelkajn trajtojn de hodiaŭaj naciaj kaj internaciaj Esperanto-asocioj. M. Zvara ĉefe donis valorajn konsilojn por efika organiza laboro, ĉerpitajn el lia multjara sperto. Por la sekva ILEF la organizintoj promesis inviti pli da prelegantoj por eviti, ke denove tutan semajnon la kursanoj vidas kaj aŭdas unu solan, kio sen malbonaj intencoj kaj spite al la plej lerta prezentmaniero kaŭzas fojfoje malkoncentriĝemajn pensojn ĉe la aŭskultantaro. Eble tiu ĉi fakto kaj la manko de konkretigita programo disponigebla al ĉiu partoprenanto, kiu helpintus preparĝon kaj almenaŭ motiviĝon de la kursanoj, estis la kaŭzoj por tio, ke

veraj, interesaj diskutoj aŭ spertinterŝanĝoj ne okazis dum la seminariaj horoj, kion bedaŭris kaj prelegintoj kaj aŭskultintoj. Tamen certe neniu el la kursanoj restis sen multaj interesaj informoj kaj konsiloj por sia estonta agado; du el ili eĉ prelegis mem, aldone al la planoj de la organizintoj: Ukrainia esperantistino pri siaj spertoj kun la sovetia Esperanto-movado, kaj, el nia lando, Katrin Mattusch, pri metodoj kaj valoro de sociologiaj esploroj en la Esperanto-komunumo. Vespere okazis lumbildprelegoj aŭ diskoteko, semajnfine logis la Altaj Tatroj, sukcese.

Grava kaj ĝojiga por ĉiu tamen estis ankaŭ la konatiĝo kun la laboro de Slovakia Esperanto-Asocio. La kvartalo de Poprad, en kiu troviĝas ĝia sidejo, nomiĝas Spiŝská Sobota, trankvila vilaĝeto iom for de la urbocentro. Preskaŭ seninterrompe dum la tuta jaro aŭdeblas tie Esperantaj sonoj, de gastoj el pluraj landoj. Mirinde, kun kiom da energio la proksimume dek personoj de la Internacia Kultura kaj Kleriga Centro realigas siajn kuraĝajn planojn: al SEA jam apartenas pluraj malnovaj domoj, du el ili estas plimalpli provizore rekonstruitaj kaj uzeblaj (kvankam ankoraŭ ne por ĉiuj gustoj kaj postuloj — vere ekzistis kelkaj higienaj problemoj), la aliaj du estas/estos rekonstruataj. Krome la asocio planas aĉeti kasteleton situanta kelkajn kilometrojn for de Poprad, al kiu apartenas sufiĉe granda ĝardeno kun pluraj dometoj. La kursanoj ĝuis la eblecon, pere de la mikrobuso de SEA, dumvizite admiri la rekonstruotan kastelon. En la centro krome funkcios biblioteko, muzeo, restoracio, vendejoj, bufedoj kaj suvenir-metiejo. Do, grandiozaj planoj, ĉefe realigotaj sur propra ekonomio bazo, en la rekonstruado de la malnovaj valoraj konstruaĵoj subtenataj de ŝtataj rimedoj. Kaj la aranĝoj, kaj la centro, kaj la belega montara ĉirkaŭo indas vizitadon de multaj esperantistoj.

Ulrich Becker

„Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj" el Ĉinio

De kvar jaroj Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj eldonas kvarfoje en ĉiu jaro grandformatan, ampleksan kajeron kun la titolo „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj". Ĝi okupas jam rimarkindan lokon inter la malmultaj seriozaj sciencaj aŭ popularsciencaj esperantlingvaj periodaĵoj.

La temaro tuŝas multajn diversajn fakojn kaj sciencajn branĉojn: Ĉefrolas natursciencaj temoj el fiziko, elektroniko, biologio, medicino, agrikulturo k. a., sed ankaŭ aperas socisciencaj artikoloj, raportoj pri sciencaj konferencoj, novaĵoj el la scienc-teknika Esperanto-movado kaj eĉ komputila terminaro (angla-Esperanta-ĉina). Ĉar la lastaj numeroj estas plenaj de interesaj raportoj pri la 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto en Pekino, ĉi tie kelkaj titoloj el la kajero 2/88 (12):

— Evoluo kaj apliko de sengrunda kultivado (pri kultivado de plantoj per nutra likvaĵo),
— La arbara fonduso en GDR (de Ingward Ullrich, GDR),
— Homo kaj spaca roboto,
— Traktado kaj komunikado de la ĉinaj ideogramoj en komputero,
— La tempo-daŭreco kaj ordemeco de la materiaj movoj,
— Laser-disko,
— Primatematikaj disertacioj,
— Nova malkovro pri la evolua leĝo de trifina folieto,
— Kontribuoj de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.
— La 21-a Internacia Konferenco de ILEI.

La artikoloj aperas en Esperanto kaj en la ĉina lingvo. Do ĉiu, kiu serioze okupiĝas pri iu ajn scienca fako, kun utilo legos tiun ĉi revuon, aŭ eĉ povos informi en ĝi pri siafaka, sialanda scienca agado.

La revuo grave helpas stabiligi sciencajn lingvonormojn kaj povas esti forumo de fak-terminaraj debatoj.

En GDR ĝi estas abonebla ĉe la Centra Estraro de GDREA kontraŭ 10 markoj.

Luksega libro el Irano

Robajoj de Omar Kajjam en 30 lingvoj. Rubaiyat of Omar Khayyam. In Languages. Preparita kaj aranĝita de Mohsen Ramezam. Teherano 1987.

Omar Chayyam (Chajjam), de 1040 — 1122, estis persa instruisto kaj poeto. Li famiĝis i. a. per siaj 280 robajoj. Robajoj estas specifaj persaj 4-versaj strofoj, popularaj ankoraŭ hodiaŭ en Irano, ofte epigramsimilaj. Liaj robajoj fariĝis parto de la monda literaturo. La Tadideh-eldonejo prezentas en luksege aranĝita libro elekton de la robajoj en 30 lingvoj. La robajojn en Esperanton tradukis Gaston Waringhien, de kiu enestas en la libro 210 robajoj.

Jen la robajo n-ro 192:

„Pri l'tago, kiu pasis, ha! Vante ne memoru;
pri l' tag', kiu ankoraŭ ne venis, ne priploru;
pri ĉio, kio estis aŭ estos, ne esploru;
de ĉi momento nuna la ĝuon ne ignoru."

Ĉiu paĝo de la libro estas kolore ornamita laŭ persa stilo, kun multaj tutpaĝaj pentraĵoj. La libro eldoniĝis dank' al la subteno de prof. Sahab Zamani kaj lia edzino Jila. La paro motoras la nuntempan iranan Esperanto-movadon. Verŝajne tiu libro estas la plej lukse aranĝita aktuale ekzistanta en Esperanto. **D. B.**

Serio de Peter Levsen 1988

Ankaŭ lastjare la Esperanto-Serio de Peter Levsen aperis regule en la gazeto „Der Morgen", organo de la Liberaldemokratia Partio en GDR.

Publikiĝis jenaj kontribuoj:

(pkp = paroltemoj kaj proverboj)

646, 8. 1. 88:
Friedensseminar in Helsinki (UEA kaj Monda Packonsilantaro)
647, 22. 1. 88:
Ein junger Verband (Kuba Esperanto-Asocio)
648, 5. 2. 88:
Durch Schaden klug (pkp)
649, 20. 2. 88:
Lassen Sie es sich schmecken (pkp)
650, 4. 3. 88:
Schiffe in Seenot (pkp)
651, 18. 3. 88:
Sie kann sich sehen lassen (pkp)
652, 8. 4. 88:
Mit leichtem Sinn (pkp)
653, 22. 4. 88:
Von Bienenzucht bis Zoologie (80-jara UEA)
654, 6. 5. 88:
Ohne Dolmetscher (22-a Konsultiĝo)
655, 20. 5. 88:
Steine im Weg (pkp)
656, 3. 6. 88:
Ein vielfältiges Leser-Echo (reagoj de legantoj)
657, 17. 6. 88:
Noch einmal — Echo unserer Leser (ankoraŭfoje pri la reagoj de legantoj)
658, 1. 7. 88:
Hefte zum Bestellen (pri „der esperantist", „Saksa Kuriero" kaj „Die rationelle Sprache")
659, 22. 7. 88:
Sturm im Wasserglas (pkp)
660, 12. 8. 88:
Für gute Verständigung (73-a UK en Rotterdam)
661, 2. 9. 88:
Abwarten und Tee trinken (pkp)
662, 16. 9. 88:
Alter schützt vor Torheit nicht (pkp)
663, 14. 10. 88:
Programm mit Pop (Unua Centra Junulara Renkontiĝo de GDREA)
664, 28. 10. 88:
Esperanto als Zwischensprache (pri DLT)
665, 11. 11. 88:
Kleine Ursachen — große Wirkungen (pkp)
666, 25. 11. 88:
Wörterbuch mit 25 000 Bezeichnungen von Spezialisten erarbeitet (Bildvortaro)
667, 8. 12. 88:
Nicht in Verlegenheit bringen (pkp)
668, 30. 12. 88:
Seminar des Weltbundes (UEA-Seminario en Ahrenshoop)

Intensa kurso en Halle

De la 22-a ĝis 26-a de majo en Halle okazis intensa kurso, kiun partoprenis 36 personoj. Lektoroj estis Eva Farkas (Hungario) kaj Anton Zaĥariaŝ (Slovakio).

Aperos konversacia libro

La eldonejo „Enzyklopädie“ Leipzig aperigos fine de 1989 aŭ komence de 1990 novan verkon, kiu certe utilos al la studantoj kaj praktikantoj de Esperanto.

Temas pri „Konversationsbuch Deutsch — Esperanto/Konversacia libro Germana — Esperanto“ de Detlev Blanke/ Till Dahlenburg.

La ĉirkaŭ 200paĝa libro „intencas helpi unuavice al germanaj esperantistoj, kiuj prizorgas eksterlandajn gastojn kun esperantlingvaj scioj. Ĝi eliras de ĉiutage kutimaj situacioj ĉe prizorgado de gastoj“. (p. 11)

Ni plue legas en la dulingva antaŭparolo: „Ĉar estas formulitaj nur eldiroj de la gastiganto resp. prizorganto, oni neniel anticipas la konkretan realiĝon de la konversacio.

Malpli temodependaj esprimkampoj estas aparte kunigitaj en la rubriko „Ĝeneralaj parolturnoj“

Leksiko de elektitaj temgrupoj (i. a. nomoj de koloroj, modalverboj) estas prezentita aparte.

La konversacia libro estas destinita ankaŭ kiel helpilo por Esperanto-instruado, kiu celas atingi kapablecon de komunikado. Pro tio ĝi proponas temorilatajn leksikajn-gramatikajn bazajn materialojn por la preparado de la instruado.

Krom tio ĝi estas destinita al aŭtodidaktoj por la memstara plivastigado de ilia individua leksika scio, ĉar laŭsperte la enmemorigo de la leksiko estas pli sukcesa, se ĝi estas enplektita en kunteksto.

Temoindeksoj germanlingva kaj Esperanta plifaciligas la trovon de koncernaj leksikaj grupoj, se tiuj ne senpere evidentiĝas en la enhavtabelo.

La stilo de la tekstoj estas konscie farita komunlingva (ĉiutaga)“ (p. 12).

Por doni imagon pri la enhavo, ni represas la ĉefan parton de la enhavtabelo:

1. Ĝenealtemaj situacioj / Salutado kaj sinprezento / Vizito de Esperanto-aranĝo / Loĝejo, domo, ĝardeno / Vilaĝo kaj eturbo / Grandurbo / Patrio / Gvidado tra kastelo / Rigardado de preĝejo / Teatra prezentaĵo / Literaturo / Filmo kaj televido / Festoj kaj festotagoj / Libera tempo, libertempo, ferioj / Sporto kaj ludoj / Manĝoj kaj manĝetoj / En la kuirejo / Medicina helpo / Profesioj kaj okupoj / Monŝanĝo / Poŝto kaj telefono / Trajnvojaĝo / Flugvojaĝo / Dogana deklaro / Vetero.

2. Parolturnoj de la instruhora lingvo / Malfermo de la instruhoro (leciono) / Ripetado / Perlaboro de la instrumaterialo / Enmemorigo kaj aplikado / Komisioj kaj taskoj /.

3. Ĝeneralaj parolturnoj / Aprobo kaj malakcepto / Neŭtralaj opini-esprimoj / Ĝojo kaj seniluziiĝo / Danko kaj peto / Gratulo kaj kondolenco / Rekono kaj malaprobo / Invito kaj propono / Malpermeso kaj pardonpeto / Ekmiro kaj indigno / Temperamento kaj karaktero / Sentoj kaj impresoj / Spertoj kaj vidpunktoj / Promeso kaj devigo / Interkonsento kaj kontrakto / Sanstato.

4. Elektitaj leksiko-grupoj / Modalaj verboj / Kolornomoj / Nomoj de gustoj / Numeraloj / Tempindikoj per numeraloj / Matematikaj operacioj kaj simboloj / Nedeterminitaj numeraloj / Kemiaj elementoj (elekto) / Bildecaj esprimoj kun nomoj de kemiaj elementoj / Proverboj bestrilataj / Nomoj de kelkaj memstaraj ŝtatoj (sen -io/-ujo/-lando) kaj iliaj ŝtatanoj.

5. Superrigardoj pri gramatiko (elekto) / Prononco kaj akcento / Tabelvortoj / Afikso-tabelo / Vortfinaĵa tabelo.

6. Literaturindikoj

7. Temindekso Esperanto

8. Temindekso Germana

La libro estas jam nun antaŭmendebla en la librovendejoj kaj anoncita en „Vorankündigungsdienst des Buchhandels“ n-ro 37/89/26. Mendo-n-ro 578/296/6.

Nova eldono de la poŝvortaro G/E

La poŝvortaro Germana-Esperanto de Erich-Dieter Krause aperos en nova eldono. Ĝi estas anoncita en „Vorankündigungsdienst des Buchhandels" 37/89/29, Mendo-n-ro 575/506/6.

Germanlingva gramatiko reaperis

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis la tria eldono de „Ausführliche Sprachlehre des Esperanto" („Detala gramatiko de Esperanto") de Hermann Göhl. Pro manko de alia ampleksa germanlingva gramatika konsultilo, GDREA represigis tiun ĉi pli ol tricentpaĝan libron de 1932 (dua eldono 1973), kiu restas unika kaj valora pro sia detalemo, kvankam ĝi ne konsideras la lingvoevoluon de la lastaj kvindek jaroj.
La ĉapitroj: Prononcado kaj ortografio; vortfarado; artikolo; substantivo; adjektivo; numeralo; pronomo; prepozicio; verbo; adverbo; konjunkcio; interjekcio; mallongigoj; vortordo; stilistikaj rimarkoj; indekso.
La gramatiko estas havebla ĉe GDREA kaj kostas 15 markojn (por eksterlandanoj 25 markojn).

GDR-eldono de „Paco" kun varia enhavo

Laŭ bona kutimo, la MEM-sekcio de GDR eldonis ankaŭ en 1989 kvardekpaĝan kajeron „Paco".
Ĉeftemoj estas paco kaj internacia kunlaboro por malarmado kaj sekurigo de la pluekzistado de la speco homo. Tio inkluzivigas elpaŝojn de politikistoj (Gorbaĉov antaŭ UN), zorgojn de sciencistoj (paco kaj psikologio), regionan pacagadon (Eŭropa sekurecpolitiko; zonoj sen atomarmiloj), ekologiajn problemojn kaj la ekspluatadon de la Tria mondo. Iom centre de tiu ĉi temaro staras la artikolo „Eŭropo — nia komuna domo".
En 1989, GDR fariĝis kvardekjara. „En la kvindekaj jaroj" nomiĝas artikolo de Ludwig Schödl, kiu priskribas siajn rememorojn, ankaŭ kiel esperantisto. Festivalo de la politika kanto — Wilhelm Foerster — historiaj eventoj — Esperanto en Azio — Recenzoj — prozo kaj poezio — koresponddeziroj: jen kelkaj el la temoj kaj rubrikoj kompletigantaj la kajeron.
„Paco" 1989 kostas 1,— markon kaj estas mendebla ĉe la centra estraro de GDREA.

Vorankündigung

**Im 1. Quartal 1990 erscheint von Joachim Dietze: Frequenzwörterbuch Esperanto-Deutsch.
Die meistgebrauchten Wurzeln der Esperanto-Literatursprache. Halle/S.**

Das Wurzelwörterbuch des Esperanto dient dem Zweck, dem Lernenden rund 1 100 Esperanto-Wurzeln anzubieten, die auf Grund ihrer Vorkommenshäufigkeit als Grundwortschatz der Literatursprache anzusehen sind. Der alphabetisch geordnete Hauptteil bringt die Wurzeln mit Angabe ihrer absoluten Frequenz und den deutschen Entsprechungen nach der Primärwortart. In einem zweiten Teil werden die Wortwurzeln frequenzorientiert gesondert dargeboten (laufende Nummer, Rang, absolute und relative Frequenz). 41 Präfixe des Esperanto werden in einem eigenen Teil nach ihrer Vorkommenshäufigkeit verzeichnet unter Angabe ihrer Grundbedeutungen. In der Einleitung zum Wörterbuch wird die computergestützte lexikographische Methode, die angewandt wurde, beschrieben und das Sprachmaterial linguostatistisch ausgewertet.
Für das Vertriebsgebiet DDR wird der Preis ca. 7,— Mark betragen; die Publikation ist über die folgende Einrichtung zu beziehen, wobei Sammelbestellungen bevorzugt beliefert werden: Abteilung Wissenschaftspublizistik der Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg, August-Bebel-Str. 13, Halle/S., DDR — 4010.

(Anonco pri frekvencvortaro Esperanto-germana de Joachim Dietze; la vortaro enhavas la plej ofte uzatajn radikojn de la Esperanta literatura lingvo.)

Laste aperis

— Arbo de la sciado, La. Pío Baroja (1872 — 1956). El la hispana trad. Fernando de Diego. La Laguna: J. Régulo, 1973; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 222 p. 21 cm. Stafeto: Belliteratura serio 31. Filozofia romano pri la sopiro al homa perfektiĝo: amara, melankolia, ĝi tamen lasas impreson de trankvilo.

— Aventuroj de pioniro. Edmond Privat (1889 — 1962). La Laguna: J. Régulo, 1962; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 143 p. 19 cm. Fotoj. Stafeto: Beletraj Kajeroj 17. La tekstoj de 55 mallongaj radioprelegoj, kiuj skizas la karieron, movadan kaj nemovadan, de unu el la plej gravaj intermilitaj aktivuloj.

— Baptode Caro Vladimir, La. Karel Havlíček Borovsky (1821 — 1856). El la ĉeha trad. Tomaš Pumpr (1906 — 1972). La laguna: J. Régulo, 1953; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 141 p. 22 cm. Stafeto, Belliteratura serio 2. Humuraj ilustraĵoj de Josef Lada. Ridinde komika historio pri la dronigo de dio, en majstra traduko.

— Bibliografio de disertacioj pri Esperanto kaj interlingvistiko. Komp. Edward Symoens. Rotterdam: CED/UEA, 1989. 159 p. 20 cm. Listigas pli ol 120 verkojn, kune kun teknikai detaloj kaj resumo de la enhavo.

— Chongjon. La baza skribo de Wonbulgyo. El la korea trad. Ch'oe Tae-sok, Hong Song-jo, Yook Cheol. Seulo: Wonbulgyo-Esperantista Societo, 1988. 175 p. 18 cm. Bela dulingva eldono de la baza skribo de korea budhisma religio, fondita de Pak Chung-bin (1891 — 1943).

— De Mickiewicz al Goethe. Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof: Tradukaĵoj, volumo 2. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1988. 499 p. 21 cm. Enhavas la originalajn tekstojn de i. a. La revizoro, La predikanto, La rabistoj, La psalmaro, du fabelojn de Anderson, kaj Ifigenio en Taŭrido.

— De Molière al Ŝalom-Alejĥem. Iam kompletigota verkaro de L. L. Zamenhof: Tradukaĵoj, volumo 3. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1988. 499 p. 21 cm. Enhavas la originalajn tekstojn de i. a. Georgo Dandin, Marta, La sentencoj de Salomono, Proverbaro Esperanta, La gimnazio.

— Die Etablierung der Interlinguistik als Wissenschaft und ihre möglichen Auswirkungen auf den Sammlungsauftrag des Internationalen Esperanto-Museums in Wien (IEMW). Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 50 p. 30 cm.

— El la vivo de bervala sentaŭgulo. Louis Beaucaire (1925 — 1984). La Laguna: J. Régulo, 1974; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 134 p. 18 cm. Stafeto: Beletraj Kajeroj 46. Sprite esperantisma „maldeceta epizodaro".

— En la brikejo (1897). J. Wasniewski. Postparolo de Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 18 p. 21 cm. Tre realisma rakonto kun freŝa naturpriskriba stilo.

— Esperanto-kurso por televida disaŭdigo. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1987. 185 p. ISBN 7-5382-0347-8. 19 cm. Ĉinlingva kurso.

— Esperanto simple. Kurso de la internacia lingvo en 7 lecionoj. Lilia Fabretto. Romo: Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, 1988. 76 p. 17 cm. Ilus. Por itallingvanoj.

— Ferio kun la morto. Karl Lindqvist. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1988. 149 p. ISBN 7-205-00276-1. 18 cm. Vigla, simplastila krimrakonto kun ĉinlingvaj tradukoj, glosoj.

— Hirthara Petro (1845). Heinrich Hoffmann (1809 — 1894). Postparolo de Hedwig Fischer. El la germana trad. Rudolf Fischer. Neustadt an der Weinstrasse: D. Meininger GmbH, 1988. 48 p. ISBN 3-87524-077-4. 20 cm. Kolorilustrita eldono de fama germana infanlibro, amuza poemaro pri geknabaĉoj kaj aliaj.

— Impreso en pluvo. Gong Xuesheng (1952). Munkeno: Esperanto Eldonejo, 1988. 47 p. 21 cm. Pensige metafora poemaro.

— Infano el la alta maro kaj aliaj rakontoj, La. Jules Supervielle (1884 — 1960). El la franca trad. Hervé Gnoin k.a. Parizo: UFE, 1988. 64 p. 21 cm. Franca Esperantisto, n-ro 394 (Antologieto de la franca literaturo). Fabeloj verkitaj de „urugvaja" franca poeto, pri „revuo kaj realeco, farso, angoro".

— Intereso kaj utilo de komuna interlingvo, la Div. aŭtoroj, red. Eddy Rosseel, Edward Symoens. Brussel: AIMAV, 1988. 86 p. 20 cm. Dek prelegoj en Esperanto (2), la angla (4) kaj la franca (4), pri lingvoproblemoj (precipe en Eŭropo) kaj diversaj eblaj solvoj.

— Komunikado. Div. aŭtoroj, reg. Philippe Cousson. Poitiers: Evangeliaj Kajeroj 4, 1988. 88 p. ISSN 0984 7626. 21 cm. Eseoj el diversaj religiaj vidpunktoj.

— . . . Iun siaspeca spico! Raymond Schwartz (1894 — 1973). La Laguna: J. Régulo, 1971; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1988. 215 p. 22 cm. Antologio el la humuraĵoj de Schwartz, represitaj ĉefe al diversaj revuoj; i. a. enestas la tuta serio de Laŭ mia . . . ridpunkto.

— Language in religion. Div. aŭtoroj, red. Humphrey Tonkin kaj Allison Keef. New York: CED, 1988. 141 p. 28 cm. Referaĵoj el konferenco en majo 1987, anglalingvaj kun Esperantaj resumoj; traktas kiel ĉeftemojn la rolon de lingvo en la kredo, la praktikan funkcion de lingvo en diversaj eklezioj, kaj lingvon kiel religian komunikilon kaj organizilon.

— Laŭta vekhorloĝo, La, kaj aliaj atentokaptiloj. Stefan MacGill. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 200 p. ISBN 963 571 2464. 20 cm. Paroliga legolibro, kun kvar amuzaj rakontoj, ekzercoj, rolludoj, desegnaĵoj ktp., kaj kelkaj notoj por instruistoj.

— Lernolibro de Esperanto. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1987. 163 p. 18 cm. Por ĉinglingvanoj.

— Libro de amo. „Peter Peneter" kaj „Georgo Peterido Peneter". Byblos: Je la ŝildanonco de „L'Akacio", 1969; dua bindo, Roterdam: UEA, 1988. 262 p. 20 cm. Enhavas la faman amoran poemciklon „Sekretaj sonetoj" (1931) kaj diversajn similtemajn poemojn, originalajn kaj tradukitajn.

— Lingvonormiga reformo de Esperanto. Manuel Halvelik. Bailieboro: Esperanto

Press, 1988 (neindikita). 203 p. ISBN 0-919186-34-3. 29 cm. Proponoj por adapto de Esperanto al la postuloj de aŭtomata analizeblo kaj optimuma kreo de sciencaj terminoj.

— Litovio hodiaŭ. 1988, 1 (30). Div. aŭtoroj. El la litova trad. P. Lukosevicienė, T. Lukosevicius, K. Puodenas. Vilnius: Litova Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj, 1988. 83 p. ISSN 0235-0769. 19 cm.

— Malegalajoj: Ĉu fatoq Alan Cavalier. El la franca trad. Kultura Esperanto-Centro de Angers. Saint Aubin de Luigne: Monda Fonduso de Solidareco kontraŭ la Malsato, 1989. 15 p. 21 cm. Klarigo de evoluhelpa agado surbaze de ekzempla kazo de brazilaj kamparanoj.

— Mi estas nur virino. Anna Swirszczynska (1909 — 1984). El la pola trad. Tomasz Chmielik. Varsovio: Pola Studenta Esperanto-Komitato, 1988. 37 p. 20 cm. Forte emociaj, defie intimaj liberversajoj pri virina vivo.

— Per espero al despero (1910). Stanislav Schulhof (1864 — 1919). Postparoleto de Herbert Mayer. Vieno: Pro Esperanto, 1989. 26 p. 21 cm. La unua poemaro de frua Esperanta verkisto, fama pro la pesimisma „Desperanto".

— Por la homo. A. Urbonas kaj K. Trečiakauskas. El la litova trad. Povilas Jegorovas. Vilnius: Mintis, 1988. 114 p. 19 cm. Bind. Rakonto pri la kuraco de knabino post akcidento, kiu vere okazis kaj famiĝis tra Sovetunio.

— Por la traktata reglamentado de la afero Hoang Sa-Truong Sa (Paracels-Spratly). Hanojo: revuo Vietnamaj Studaĵoj, 1988. 25 p. 12 cm. Mapo. Klarigo de la vjet nama pozicio en teritoria disputo kun Ĉinio.

— Sano. Strategio por ŝanĝo (1982). Mário M. Chaves. El la portugala trad. Paúlo Sergio Viana. Brasília: Brazila Esperanto-Ligo, 1988. 120 p. 23 cm. Tabeloj ktp.. Tre klara populara skizo de la krizo en la monda san-sistemo kaj de la programo de Monda San-Organizo kaj aliaj por ŝanĝi ĝin.

— Sen pardono. Claude Piron. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 20 p. 21 cm. Psikologia rakonteto kun glosoj kaj traduko por germanlingvanoj.

— Sentoj kaj argumentoj (Notoj de esperantisto). Vl. Černov. Baku: Bakua Esperanto-Klubo „Hazar", 1988. 47 p. 21 cm. Esperantismaj aforismoj, ŝercoj ktp. en Esperanto kaj la rusa.

Skota lingvo, hodiaŭ kaj hieraŭ, La. William Auld (1924). Eldonejo Kardo, 1988 (loko neindikita). 16 p. 21 cm. Konciza prezento de la moderna skota, kun klarigoj pri la diferencoj inter ĝi kaj la moderna angla.

— Sociaj aspektoj de la Esperanto-movado. Div. aŭtoroj, red. Senad Ćolic. Sarajevo: ELBIH, 1988. 136 p. 19 cm. Kolekto de tre diversaj referaĵoj el jubilejara konferenco en Banjaluka, inkluzive de kelkaj tre valoraj.

— 33 Rakontoj. La Esperanta novelarto. Div. aŭtoroj, red. Reto Rossetti kaj Ferenc Szilágyi. Enkonduko de Ivo Rotkvic. La Laguna: J. Régulo, 1964; dua bindo, Roterdamo: UEA, 328 p. 23 cm. Stafeto: Belliteratura serio 22. Bind. Klasika antologio, kun tre larĝa gamo de landoj (17), stiloj kaj temoj.

— Ventovoĉo en la vilaĝo Yamanasi. Taniguti Misao. El la japana trad. Harada Takako k. a. Ootu: Ootu Esperanto-Societo, 1988. Kompleto de la orginala japana eldono (23 x 30 cm, 32 p. kun tutpaĝaj koloraj pentraĵoj de Suzuki Yasumasa) kaj Esperanta traduko (18 x 27 cm, 16 p., unukolora). Ekologia infanrakonto.

— Vivi estas danĝere. István Nemere. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 159 p. ISBN 963 571 2386. 20 cm. Streĉa spionromano en simpla, glata lingvaĵo; prosalajra batalisto Daniel Skagen trovas sin portempa sekreta policisto, sed ĉu la polico samopinias?

— Vojaĝo inter la tempoj. K. Kalocsay (1891 — 1976). La Laguna: J. Régulo, 1966: dua bindo, Roterdamo: UEA, 1988. 197 p. 22 cm. Stafeto: Movado 4. Gramatika studo pri la konjugacio en Esperanto.

— Zamenhof, aŭtoro de Esperanto. Marjorie Boulton (1924). La Laguna: J. Régulo, 1962; dua bindo, Roterdamo: UEA, 1989. 267 p. + 24 p. fotoj. Stafeto: Movado 3. 21 cm. Klasika biografio, ankoraŭ la plej bona populara prezento.

— Zamenhofa teksto de la Malnova Testamento, La. D. B. Gregor. Eldonejo Kardo, 1988 (loko neindikita). 11 p. 31 cm. Detala komparo inter la zamenhofa traduko kaj tiu publikigita de la Biblia Komitato en 1926.

— Atlaso de insekta morfologio, Esperanta-latina-ĉina. Latina originalo de H. Steinmann kaj L. Zombori. El la latina en la ĉinan kaj Esperanton trad. Li Kexi. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 45 p. ISBN 7-5052-0000-3. 20 cm. Bind. Detale ilustrita trilingva terminaro.

— Ĉina-Esperanta vortaro por scienco-teknika Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1988. 499 p. 18 cm. Unudirekta vortopara terminaro.

— Dokumentoj kaj materialoj. La 19-a tutsovetia konferenco de KPSU. Raporto, elpaŝo kaj parolo de Ĝenerala Serketario de CK KPSU Miĥail Gorbaĉov. El la rusa trad. L. Novikova k. s. Moskvo: APN, 1988. 142 p. 19 cm.

— Estona-Esperanta-rusa naturprotekta vortaro. Eesti-Esperanto-Vene looduskaitse. sônastik. Komp. J. Eilart, F. Eisen. Red. J. Ojalo. Tallin: Izvestija Estonskogo Obŝĉestva Okhrany Prirody, 1985. 13 p. 28 cm. 168 terminoj.

— Fantoma edzino, La (ĉ. 1930). Eduard S. Payson. Vieno: Pro Esperanto, 1988. 20 p. 21 cm. Lingve klasika rakonto pri stranga okazaĵo en usona montaro.

— Gvidlibro pri Liaoning-provinco. Shenyang: Liaonino-Belarta Eldonejo, 1986. 44 p. 19 cm. Kolorilus.

— Konciza Esperanta-ĉina vortaro por scienco-teknikoj. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1985. 321 p. 18 cm. Unudirekta vortopara terminaro.

— Konciza gramatiko de Esperanto. Beijing: Pekina Esperanto-Asocio, 1987. 122 p. ISBN 7-5382-0353-2. 18 cm. Por ĉinlingvanoj.

— Kratkij samouĉitelj esperanto. V. G. Gakalenko. La aŭtoro, 1988 (loko ne indikita). 46 p. 21 cm. Ruslingva lernolibreto.

KORESPONDDEZIROJ

GDR

Familio Christa + Alexander Boschanow, Berliner Str. 64, **Dresden 8020** (37j.), dez. kor. kun esperanta familio aŭ E-klubo tutmonde pri kulturo, germana lingvo, filatelio, ekonomiko.

Walheide Müller, Am Ufer 16, **Wildpark-West 1501,** dez. kor. tutmonde pri aktualaj problemoj, spertoj, popolkutimoj.

Elke Feige, Nr. 2, **Klessig 8261,** 25j., dez. kor. tutmonde pri familio, loĝloko, manlaboroj; kol. bk, pm.

Filatelisto, 42j., dez. kor. tutmonde per afranko- interŝanĝo pri la temo: religia arto k personecoj: Bernhard Manegold, August-Bebel-Str. 57, **Leineselde 5600.**

Birgit Reschke, Clara-Zetkin-Str. 4, **Wittstock/ Dosse 1930,** dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo; kol. bk.

Komencanto, 30j., dez. kor. nur kun soc. landoj p. ĉ. t.:
Bernfried Gäde, K.-Liebknecht-Str. 38, **Graal-Müritz 2553.**

42j. ekonomiisto dez. kor. tutmonde pri E-movado, kulturo, turismo, ekonomio, scienco tekniko, ĉiutaga vivo: Frank Münzner, Comeniusweg 17, **Zwickau 9545.**

Olaf Harnisch, Am Kloster 1, **Dahme 7962,** dez. kor. tutmonde pri literaturo, medicino, pedagogio, kaktoj, kuirarto.

39j. matematikisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., i. a. pri filozofio, naturprotektado, mikrokomputiloj: Werner Mittag, Rostocker Str. 16, **Magdeburg 3016.**

Heinz Langhoff, Otto-Ganzer-Str. 15, **Brandenburg 1800,** dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, filatelio.

Werner Heidler, Am Seeufer 3, **Magdeburg 3034,** dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., i. a. pri literaturo, libroj, muziko, politiko, turismo.

Peter Werner, Alfred-Kurella-Str. 7, **Eberswalde-Finow 1307,** dez. kor. tutmonde pri muziko, literaturo, grafikoj, vojaĝoj, landoj, popoloj.

Argentino

Ernesto Caruso. C. C. 96, **1419 Buenos Aires,** dez. kor. tutmonde, kol. revuojn, broŝurojn.

Bulgario

26j. kuracistino dez. kor. kun geesp. el GDR: Pepa Mitovska, **5600 Troyan,** str. Kolarov 17.

Ĉeĥoslovakio

29j. ĝarden-teknikisto dez. kor. kun germane parolantaj landoj p. ĉ. t.: Jiři Šilc, Jankovice 166, **68704 Traplice.**

Ĉinio

Komerca ekonomisto dez. kor. tutmonde pri literaturo, geografio, fotografado, filatelio, belarto: Wang Yongping, Qingnian-Xiang 1, **Neijang Sichuan 641000.** (29j.)

Hungario

16j. anoj de Esperanto-Klubo „Amikeco" dez. kor. tutmonde kun gelernantoj. Bv. skribi al: Kossuth Gimnázinon, **Miskolc 3525,** Dayka G. ut. 4.

20j. konstruisto dez. kor. kun geesp. el GDR pri Esperanto kaj Karate: Ladislao Balaskó, **7090 Tamási,** Ady Endre 9.

Koreo

21j. studento de Korea Juda kolegio, sportisto, dez. kor. kun sportistoj: Gim Gi-Uon, 317-24 7/2 Ĝung-ha2Dong Ĝunglang-Gu, **Seoul.**

Alĝerio

Amed Hamimi Chaourar, 10, rue de la liberté, **Guendouze 06251,** Bejaia, dez. kor. kun geesp. el GDR.

Francio

23j. komencanto, instruisto, dez. kor. tutmonde pri muziko, politiko, vojaĝoj, lingvoj, kino: Jean Paul Pierson, 39 rue Victor Hugo, **60160 Montataire.**

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16